


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 575 (10) OKTOBRO 1953



Kastelo de Langeais (*vidu paĝon 289*)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun
membrecio kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj
Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 6000



Enhavo

Specialaj Artikoloj :						paĝo
Kongresaj Pensoj : <i>Hans Jakob</i>	..	..	..	..	..	273
Fondaĵo Montevideo : <i>La Prezidanto</i>	..	..	..	..	..	275
En la lando de la kasteloj : <i>E. Motillon</i>	..	..	..	..	..	289
Vetero, Luno kaj Planedoj ! : <i>D-ro Hess</i>	..	..	..	..	..	295
39a Universala Kongreso :						
Haarlem kiel Kongresurbo	..	..	..	..	..	285
Belartaj Konkursoj de UEA :						
1953 (Dramo) La Sinjorino, kiu Kredis : <i>G. C. Jervis</i>	..	..	..	..	..	304
1953 (Poezio) La Soleca Dio : <i>J. S. Dinwoodie</i>	..	..	..	..	..	299
Renkontiĝo : <i>Eli Urbanová</i>	..	..	..	..	..	299
La Granda Aventuro : <i>J. S. Dinwoodie</i>	..	..	..	..	..	299
1953 (Prozo) Senhejmulo : <i>R. J. French</i>	..	..	..	..	..	300
1954 : Informoj	..	..	..	..	..	286
Prozo :						
En nokta horo : <i>Felix Timmermans</i>	..	..	..	..	..	291
La porketo : <i>Felix Timmermans</i>	..	..	..	..	..	292
La luphomoj de Sudameriko : <i>Erika Linz</i>	..	..	..	..	..	297
Poezio :						
Romano de Veteranaj Geedzoj : <i>J. P. Nix</i>	..	..	..	..	..	294
Konstantaj Rubrikoj :						
Centro de Esploro kaj Dokumentado	..	..	..	..	..	279
Enigma Konkurso	..	..	..	..	..	310
Esperantista Vivo	..	..	..	..	..	278
Nia Forumo	..	..	..	..	..	288
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	311
Radio kaj Esperanto	..	..	..	..	..	309
Tra la Libraro	..	..	..	..	..	282
Tra la Mondo Esperantista	..	..	..	..	..	276
Kotizoj 1954	..	..	..	..	..	312

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 575

Oktobro 1953



Kongresaj Pensoj

LA 38a kongreso jam estas historiaĵo—jam ni devas okupiĝi pri la nova ĉefurbo Esperantista, Haarlem, la loko de la 39a en 1954. Ankoraŭ sub la impreso de la pasinta kongreso tiom brile sukcesinta, ni serĉas kion la nova kongresurbo povos doni al ni. Utilus resumi cifere la okazaĵojn en Zagreb por konstati, kiom ampleksa, kiom riĉa estas ja la nuntempa Esperantista manifestacio tutmonda. La programo en Zagreb estis eksterordinare riĉa kiel pruvas jena resumo :

Laboraj kunvenoj :

Inaŭguro, fermo, ĝeneralaj kunvenoj	4
Sekciaj kunvenoj	5
Somera Universitato, inaŭguro kaj prelegoj ..	8
Aliaj kulturaj prelegoj ..	4
Fakaj kunvenoj anoncitaj en kongreslibro ..	12
Kunvenoj de la Akademio de Esperanto	2
Kunvenoj de la Komitato kaj Estraro de UEA ..	8

Distraĵoj :

Interkona vespero, balo ..	2
Arta vespero, popoldancoj, muziko	3
Ekskursoj dumkongresaj ..	3
Belartaj konkursoj, oratora konkurso	3

Tio formas kune 54 programerojn plej malsamajn, nekalkulante tiajn ekster la programo. Kiom da laboro tio postulas, nur povas realecigi tiu, kiu jam partoprenis kongreson “mal-antaŭ la kulisoj”. Pro tiu ĉi varieco, la profesia devo por raportanto ĉeesti ĉiujn aranĝojn fariĝas fizika neeblaĵo.

La admono de la Loka Kongresa Komitato en Zagreb, priatenti certajn formojn por ne ridindigi nian aferon antaŭ la publiko, estis respektata. La ĉeesto de aro da neesperantistaj turistoj, profitantaj la aranĝojn de monduma kongreso ne ripetiĝu estontece. Okazis ankaŭ, ke iuj kongresanoj forgesis pagi konsum-ajojn ĉu en Esplanade ĉu en Plitvice.

Salutinda estas la nomigo de strato laŭ D-ro Zamenhof. Dezirinde estas, ke la Zagrebaj Esperantistoj pensu je kompletigo de tiu ĉi stratnomo, fiksante ĉe la komenco de la strato ŝildon kun klarigo pri la honorigata persono. Tiel oni procedas en multaj urboj pri aliaj famuloj konataj al parto de la loĝantaro, sed ne al la alia. Alloge prezentiĝis la poŝtmarkoj honore je la kongreso.

Resume, la unua kongreso en Balkana lando bone sukcesis. Ankoraŭfoje ni danku la sindonajn samideanojn kiuj laboregis por tiu ĉi brila manifestacio.

Haarlem, la urbo de Frans Hals kaj ĉefe konata eksterlande pro la holandaj floroj, ne estas la tipa kongresurbo. Kiel ni jam atentigis, la okazigo de tiom ampleksa kongreso kia fariĝis la esperantista ne estas pluebla en aro da lokoj, kiuj ĝojegus akcepti nin je sezono nesomera. La loĝigado estas problemo; same la lokoj por la ĉefaj manifestacioj ĝeneralaj kiel la inaŭguro de la kongreso. Sed kuraĝe la samideanoj en Harlemono prenis sur sin la taskon organizi la 39an (la duan U.K. de Esperanto en Nederlando) kaj estas antaŭvidebla amasa alfluo de kongresanoj. La eksterlandaj kongresanoj konatiĝos kun lando sub la maro kaj memoros la teruran katastrofon kiu trafis alian parton de Nederlando. Certaj ni estas ke la 39a iĝos inda posteulo de la pasintaj kongresoj.

Hans Jakob.

Esperanto en praktiko

Ni devas utiligi nian lingvon praktike. Tial mi aranĝas ĉiujare karavanvojaĝojn. De la 27/6 ĝis la 1/7 mi gvidis 55 personojn (du aŭtobusojn) al Harzmontaro en Germanujo, kie ni sub gvidado de du lokaj samideanoj, S-roj Heinrich Müller kaj Murza, vizitis Goslar, Bad Harzburg, Bündheim, Achtermann, Claustal-Zillerfeld, k.t.p.

De la 2a ĝis la 17a de julio alia karavano (34 personoj) iris al Jugoslavujo. Nin gvidis en Vieno S-roj Sinner kaj Vokal. Ĉefurbestro de Vieno nin akceptis kaj alparolis en plej bonstila Esperanto. Nia jugoslava gvidantino, S-ino Pošenel el Maribor, bonege helpis al ni kaj gvidis nin al Maribor, Zagreb, Rijeka kaj Ljubljana. Ĉie ni havis agrablajn

rendevuojn kun lokaj samideanoj, kiuj ofereme klarigis al ni pri sia urbo. Per ŝipo ni iris de Rijeka al Split, kie ni ĝuis admirindan tagon. En Venecio nin gvidis S-ro Corso el Verona.

De 27/7 ĝis 5/8 okazis mia tria karavanvojaĝo: al Rudesheim ĉe Rejno. Ĝin gvidis s-ro H. Müller, Lehrte. 55 personoj en 2 aŭtobusoj partoprenis. En Bingen kaj St. Goar bonege helpis kaj tradukis S-ro Lowitzer el Bingen, kaj en Wiesbaden S-ro Karey. Dank' al ili ni ekhavis permeson viziti tri diversajn kelojn, kie oni produktas Rejnvinon, ĉampanon kaj konjakon.

En Helsingør okazis niaj kursoj 18-25 julio. Ĉeestis 160 personoj el 8 landoj. El Nederlando tien gvidis 50-personan karavanon S-ino Feitsma, Winschoten; el Anglujo S-ro Tordoff, Bristol; kaj el Finnlando F-ino Sivula, Helsinko. Ne-forgeseblan semajnon pasigis ĉiuj en la Internacia Altlernejo. Okazis la tradiciaj ekskursoj al Hälsingborg en Svedlando, al la Hamleta kastelo Kronborg, al la kasteloj Fredensborg kaj Frederiksborg—kaj al la belaj banlokoj apud Helsingør.

L. Friis.

NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO

de

LOUIS BASTIEN, Akademiano

317 paĝa, bele presita kaj bindita
Prezo 12ŝ. 6p. afranko 6p.

*Mendu ĉe vialanda librovendejo
aŭ ĉe*

**Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo**

Alvoko de la Prezidanto pri la

Fondaĵo Montevideo

La grava rezulto, kiun atingis nia movado dum la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo en nov./dec. 1952, estis ŝuldata al pluraj faktoroj, sed ĉefe al la fakto ke kompetentaj reprezentantoj de nia asocio povis persone ĉeesti la konferencon kiel observantoj.

Estas jam konate, ke la finan decidon pri nia petskribo faros la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazonta en okt./nov. 1954 en Montevideo. Al tiu konferenco la Sekretariato de UNESKO prezentos raporton, kiu estos la bazo de la diskuto kaj de la decido.

Ĉiuj instancoj de nia movado nun streĉas siajn fortojn por ke la konferenco de UNESKO en Montevideo ricevu objektivan kaj dokumentitan informaron pri la atingajoj de Esperanto sur ĉiuj kampoj de la internaciaj rilatoj, pri la socia signifo kaj kultura rolo de la Internacia Lingvo. La laboro en la kadro de la movado estas bone organizita kaj en la sekvanta jaro precipe nia Centro de Esploro kaj Dokumentado sub la gvido de Prof. I. Lapenna plenumos ampleksan planon de sciencaj esploroj, objektiva dokumentado kaj larĝa informado.

Tamen eĉ la plej bonaj antaŭ-preparoj riskas resti sen pozitiva rezulto, se ni ne povos esti reprezentitaj dum la konferenco mem de kompetenta observanto. La komitato kaj la estraro de UEA decidis sendi al Montevideo specialan reprezentanton, kiu pledos por nia afero en la Ĝenerala Konferenco mem. Por tiu celo estas necesaj relative grandaj financaj rimedoj. Mia unua alvoko ne restis senĉa. Jam alvenis en la Centran Oficejon de UEA sumo de 53 pundoj por tiu celo. Sed por modesta reprezentiĝo estas necesaj proksimume 450 pundoj.

Mi do alvokas ĉiujn esperantistojn en la mondo kontribui al la Fondaĵo Montevideo, kiu ebligos al UEA sendi reprezentanton al la sekvanta Ĝenerala Konferenco de UNESKO. La kluboj kaj societoj organizu kolektadon inter siaj membroj! La pli bonstataj esperantistoj kontribuu laŭ siaj eblecoj! Ĉiujn sumojn oni sendu al la Centra Oficejo de UEA kun klara mencio "Por la Fondaĵo-Montevideo". La nomojn de ĉiuj kontribuintoj ni regule publikigos en nia revuo.

*E. Malmgren,
Prez. de U.E.A.*

LA ALASKA STAFETO kaj KAPTITAJ DE LA GLACIROKOJ

en unu volumo

Bindita 6 ŝil., aŭfranko 4p.

Mendu ĉe UEA



Tra la Mondo Esperantista



Aŭstrujo

En la sesa Aŭstra Esperanto-Kongreso, okazinta 22-24 julio en Klagenfurt, partoprenis multaj eksterlandaj gastoj, ankaŭ landa, urba kaj eklezia aŭtoritatoj. La festparoladon faris ĝisnuna prezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio, eksministro D-ro Frenzel, en flua, vigla Esperanto. Nome de UEA salutis Estrarano Hans Jakob, kaj por la Internacia Esperanto-Muzeo Hofrat Hugo Steiner. La urbestro decidis nomi novan straton laŭ D-ro Zamenhof, kaj vekis grandan entuziasmon anonco, ke venontjare la poŝta direkcio eldonos honor-poŝtmarkon okaze de la 50-jara jubileo de la Esperanto-Movado en Aŭstrujo. La afera kunveno de AEF akceptis la eksigon (pro profesia kaŭzo) de D-ro Frenzel—kun meritita danko. Elektiĝis kiel prezidanto la fondinto de AEF, Direktoro Paul Glüxmann. Aklame estis akceptita la nomigo de D-ro Frenzel kiel Honora Prezidanto de AEF. Resume: bone aranĝita kaj bonege sukcesinta kongreso, favorita de sunbrilo kaj varmo.

Britujo

Dum la Brita Kongreso en Bournemouth je Pentekosto, okazis sukcesplena kunveno de anoj kaj amikoj de Kristana Esperantista Ligo Internacia. Ĉiuj 39 ĉeestantoj de la kunveno subtenis la proponon, ke

estu Brita Sekcio de tiu movado, kaj oni elektis sinjoron A. J. Hicks kiel prezidanton kaj sinjoron A. D. Debenham kiel sekretarion. La nomo de la nova societo estas Fellowship of British Christian Esperantists. Ĝi estas fakte parto de K.E.L.I. ĉar ĉiuj anoj devas samtempe esti K.E.L.I.-anoj. Interesatoj bonvolu sin turni al S-ro A. D. Debenham, 31 Bangalore Street, Putney, London S.W.15.

* * *

La redaktoro de la Brita ĉiumonata gazeto "Health and Life" (Sano kaj Vivo) petis, ke S-ro J. W. Leslie, Sek. de B.E.A., prizorgu tutan (500-vortan) paĝon en Esperanto ĉiumonate, de septembro ĉijare. Tio rezultis el anglalingva recenzo kiun skribis S-ro Leslie pri la nova verko, "La arto fariĝi centjara". Lia recenzo aperos en la septembra numero de la gazeto. Ĉiu, kiu havas informojn kaj novaĵojn pri vegetarismo, naturkuracado k.s., nepre skribu regule al S-ro J. W. Leslie, ĉe Health and Life, 396 City Road, London E.C.1.

Francujo

Okaze de la 38a U.K. en Zagreb la lokaj gazetoj en Marseille presis detalajn artikolojn kaj bildojn antaŭ kaj post la kongreso. La karavano organizita de la grupo en Marseille havis 22 partoprenintojn.

Survoje de Zagreb al Haarlem Ges. Mason Stuttard restis dum kelkaj

tagoj en Marseille. La gazeto "Le Provençal" intervjuis nian K.K.S. kaj presis bonan artikolon kun foto; ankaŭ intervjuo de 6 minutoj estis dissendata de la Radio-Stacio en Marseille. Tiu dissendo temis pri la rezulto de la kongreslaboro kaj la aktuala disvastigo de Esperanto en la mondo. S-ro Bourdelon, prezidanto de la grupo en Marseille, akompanis S-ron Stuttard kaj estis lia interpretisto.

* * *

La nova "Mouvement Unioniste" ĵus atingis grandan venkon en la kadro de siaj porpacaj celoj, nome instruadon de Esperanto en ĉiuj unuagrada lernejoj de la departementoj Haut-Rhin, Bas-Rhin kaj Moselle. Ĉiuj nelernantoj de la germana lingvo en la finaj klasoj lernos Esperanton. Tio rezultas el decido de la Ministro de Nacia Edukado, post konstato, ke francaj lernintoj de Esperanto povos komprenigi sin ne nur en Germanujo, sed ankaŭ korespondi kaj paroli kun la tuta mondo. Tiu movado plue antaŭvidas baldaŭan agadon, kunlabore kun ĉiuj Esperantistoj kaj amikoj de la paco, por ĝeneraligita instruado de Esperanto.

Italujo

Dum sia trapaso tra Venecio, survoje al Haarlem, la K.K.S. S-ro Mason Stuttard 17an de aŭgusto havis intervjuon en la itala radio. S-ro Stuttard parolis pri la intereso de UNESKO pri Esperanto kaj pri la venonta Kongreso en Haarlem. La parolado okazis en Esperanto kaj D-ro Vascon interpretis. Raporto pri la vizito de S-ro Stuttard kaj pri lia laboro por Esperanto aperis en la regiona gazeto *Gazzettino*.

Neesperantista entrepreno uzas Esperanton

En la urbo Siracusa (Sicilio) la Internacia Asocio por Defendo de la Junulino malfermis du loĝejojn por la turistinoj. Por helpi la eksterlandajn turistinojn oni parolas Esperanton. Skribu por kuraĝigi la entreprenon aŭ por peti informojn al la "Protezione della Giovane presso Quattrocchi", Via Vittorio Veneto 92, Siracusa (Sicilio).

Norvegujo

Jarkunveno de N.E.L. en Narvik

Norvega Esperantista Ligo okazigis sian jarkunvenon la 4an kaj 5an de julio en la malproksima nordo por la unua fojo. Tamen partoprenis ĝin 60 membroj; venintoj el suda Norvegujo spertis 2-tagan streĉan vojaĝon por atingi la kongresurbon. La kunvenon aranĝis la Nord-Norvega Distrikta Organizaĵo de N.E.L. sub gvidado de sia energia prezidanto, S-ro Georg Rokkan. Dum ĝi esprimiĝis la deziro, ke la jarkunvenoj de tempo al tempo okazu somere anstataŭ Pentekoste, ĉar i.a. tia aranĝo ebligus al norvegoj, svedoj kaj danoj kelkfoje viziti reciproke jarkunvenojn en la aliaj landoj. Post elektado de la oficistoj (plejparte reelektaj) oni dekoraciis S-ron Rokkan kaj S-inon Madeleine Haudebine per la ordeno de N.E.L. "Pro Merito". La harmonia kunveno finiĝis per ŝipekskurso sur la fjordo. Ĝi estis plene sukcesinta je siaj celoj, el kiuj ĉefa estis starigi firman kontakton kun la fora nordo kaj helpi al plivigligo de la tiea movado.

Svedujo

Denove, nun por la 7a fojo post la milito, okazis komence de julio kurso

de Esperanto por svedaj kristanoj, ĉijare en la kristana somerhejmo Uskavi inter la urboj Nora kaj Lindesberg. La instruado celis eduki kursgvidantojn kaj estis donata de S-ino Anna Alamo-Sandgren kaj Lennart Sundman. Krom lingva perfektigo oni pritraktis la religian terminaron en Esperanto kaj la svedajn kristanajn historion kaj nunan staton. Inter la lernantoj estis sveda misiistino, kiu prelegis pri la protestanta misio en Franca Kongo, kie ŝi deĵoras kiel lerneja rektoro. Subvencion al la kurso donis Libereklezia Studfederacio.

Usono

En Madison, la belega ĉefurbo de la usona ŝtato Wisconsin, la 2an ĝis la 5a de julio okazis la Unua Kongreso de la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko. Kunvenis membroj el la proksimaj kaj malproksimaj ŝtatoj, ankaŭ du el Kanado. La Prezidanto, S-ro Gilbert Nickel, tre lerte gvidis la kunsidojn, ĉe kiuj estis diskutata la nova konstitucio. La estraro prezentis promesplenajn planojn de agado, por propagando, instruado kaj speciala laboro celanta subtenon de Esperanto dum la 8a konferenco de UNESKO en Montevideo. Inter aliaj programeroj okazis balo, kun solviolona kaj solkanta koncerto, kaj miroplena trarigardo al la libraro de pli ol dekmil libroj de Glenn Turner, ĉefo de la Liga Literatura Vendejo. Vicprezidanto John L. Lewine, Sekretario Louis Dormont kaj Redaktoro James D. Sayers parolis en radioprogramo por dek radiostacioj en la mezlando; la du lokaj tagĵurnaloj plej kontentige raportadis, kun grandaj unua-paĝaj bildoj kaj specialaj artikoloj.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Forné. Al Ges. J. Juan Forné, en Valencia, Hispanujo, unua infano, filino Maria, 31an de julio 1953.

Gilles. Al Ges. André Gilles, 12 Boulevard Dieu-Lumière, Reims, Francujo, naskiĝis filino, Geneviève, je la 9a de aŭgusto 1953.

Al ĉiuj ni esprimas sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Cent, S-ro Jack (antaŭe Jak Centnerszwer el Varsovio), mortis en Glasgovo, Skotlando, la 20an de aŭgusto, 55-jara.

Fairbairn, Pastro R. Edis, mortis en Kanado la 31an de majo 1953. Esperantisto de la fruaj jaroj, li multe laboris por la movado kaj estis ofta kontribuanto al nia revuo.

Gill, S-ro John Arthur, mortis en Croydon, Anglujo, je la 28a de aŭgusto, 75-jara.

Hung, S-ro Ernst, Zürich, Svislando, forpasis je la 21a de aŭgusto 1953.

Montserrat Farigola, S-ro F., en Barcelona, Hispanujo, mortis je la 18a de julio 1953, 69-jara.


Tomás, S-ro Pedro, el Rosario, Argentino, mortis en aŭgusto, 42-jara.

Datrevenoj

Kamaryt, D-ro Stanislav, nun vivanta en Choteboř, Ĉeĥoslovakujo, iĝos 70-jarulo la 10an de novembro 1953. Li multe laboris por nia movado de 1910, redaktis gazetojn, kompilis la Filozofian Vortaron, estis Prezidanto de la 13a Kongreso en Praha, kaj elektiĝis Honora Membro de UEA.

Pitlik, D-ro Augustin, iĝis 70-jarulo la 24an de julio 1953. Honora Membro de UEA, lia nomo estas intime ligata al la movado en Ĉeĥoslovakujo, kie li laboris ek de la plej fruaj tagoj de nia movado. Li fariĝis plej konata pro rondvojaĝo Eŭropa en la tempo kiam tio estis maloftaĵo en nia movado.

Al ambaŭ jubileantoj gratulon kaj saluton.



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Laborplano Por la Jaro 1953-54

La taskoj de CED fariĝas de monato al monato ĉiam pli multnombraj kaj la laboro ĉiam pli ampleksa. Por eviti deflankiĝon de la fundamentaj bezonoj de la Movado en la nuna periodo kaj por sukcese plenumi la bazajn taskojn, estis necese starigi koncizan laborplanon por la jaro 1953/54. Tiu ĉi laborplano, proponita de la honorofica direktoro kaj aprobita de la Komitato en Zagreb, konsistas el jenaj punktoj:

(1) Pliampleksigo de la reto de kunlaborantoj. En la nuna momento CED havas 72 kunlaborantojn en 17 landoj kompare kun 54 kunlaborantoj en 14 landoj en Marto 1952.

(2) Daŭrigo de la kolektado kaj registrigo de la dokumenta materialo.

(3) Plua regula eldonado de la dokumentoj en la angla, franca kaj nederlanda lingvoj. La dokumentoj en la angla lingvo estos, kiel ĝis nun, multobligataj, dum tiuj en la franca kaj nederlanda lingvoj estos eldonataj en maŝintajpita formo. La plano antaŭvidas la eldonon de 20 pliaj dokumentoj.

(4) Kompletigo de la Bibliografio pri Esperanto-eldonaĵoj.

(5) Fino de la enketo pri la socia konsisto de la Esperanto-Movado kaj publikigo de konciza raporto pri tiu demando.

(6) Studo pri la aĝo kaj metodoj de lernado de Esperanto surbaze de la enketo entreprenita komence de 1953.

(7) Eldono de verko en Esperanto pri la atingiĝoj de la Internacia Lingvo en ĝia 66-jara funkciado. La verko havos la titolon "La Internacia Lingvo" kaj la subtitolon "Faktoj pri Esperanto".

(8) Eldono de konciza dokumenta verketo en la angla, franca kaj hispana lingvoj pri la kontribuo de la Esperanto-Movado al la celoj de UNESKO. La verketo aperos antaŭ la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo.

(9) Livero al UNESKO de specialaj informoj, bone dokumentitaj, pri la diversaj aspektoj de la Esperanto-Movado.

(10) Verkado de mallongaj artikoloj por distribuo al la kunlaborantoj en diversaj landoj kun la celo, ke tiuj artikoloj estu publikigitaj en la nacilingva gazetaro.

(11) Atenta observado de diversaj projektoj kaj proponoj por solvi la lingvan problemon en internaciaj rilatoj. Studo de ilia argumentado, kaj kontraŭargumentado fare de CED en okazo de bezono.

(12) Personaj intervenoj ĉe diversaj internaciaj instancoj, publikaj prelegoj kaj konferencoj.

CED dediĉos tute specialan atenton al bona preparo de dokumenta materialo por la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo, tiel ke la konferenco povu ricevi science objektivan bildon pri la Internacia Lingvo, pri ĝia socia signifo kaj pri

ĝia kultura rolo. Tiu speciala plano antaŭvidas ampleksan laboron sur la kampoj de esploroj, dokumentado kaj informado. Estas tro frue paroli pri la laboro jam farita, nun farata kaj ankoraŭ farota por tiu speciala celo. Pri tiu laboro la tuta esperantistaro estos informita post la konferenco en Montevideo. Tamen, jam nun estas eble diri, ke la multnombraj taskoj estas laŭplane disdonitaj al diversaj kunlaborantoj de CED, kiuj plenumas ilin vere bonege kaj absolute akurate. La tuta esperantistaro povas plene fidi, ke CED kaj ĝiaj kunlaborantoj plenumos sian devon.

Raporto pri la laboro de CED

Konciza raporto pri la laboro de la Centro por la periodo de la 1-a de Aŭgusto 1952 ĝis la 31-a de Marto 1953 aperis kune kun la raporto de la Estraro de UEA de la 1-a de Julio. Tiu sama raporto aperis ankaŭ en la dua parto de la Jarlibro de UEA, pri kio estas atentigataj ĉiuj personoj, kiuj interesiĝas pri la aktivecoj de CED.

La Kvara Komisiono de la Komitato de UEA en Zagreb esprimis sin pri la laboro de CED per jenaj vortoj :—

“La Komisiono povas nur esprimi sian profundan admiron, ke per tiel modestaj rimedoj estas farata tiel grandskala laboro. Ĝi forte substrekas la vortojn en la raporto, ke tiu ĉi laboro donas instigon al ĉiuj aliaj, kiuj laboras por la afero de la Internacia Lingvo, kaj ĝi aldonas al tio, ke tiu ĉi laboro plene meritas la fortan apogon kaj moralan kaj materialan de ĉiuj esperantistoj.”

Al tiu ĉi raporto de la Kvara Komisiono, akceptita ĉiuvoĉe de la Komitato, ni aldonas novan alvokon

al ĉiuj Esperantistoj: subteni per donacoj la laboron de CED, por ke ĝi povu senĝene realigi siajn multnombrajn taskojn. Oni ne forgesu, ke 72 kunlaborantoj sindone oferas siajn kapablojn, tempon kaj energion kaj ke ili ne nur ne ricevas ian ajn honorarion por tiu grava laboro, sed eĉ mem finance kontribuas por ĝi.

ENKETO PRI LA KRIZO DE INTERNACIAJ KONGRESOJ

La Unio de Internaciaj Asocioj (Union of International Associations) entreprenis enketon pri la krizo de internaciaj kongresoj. Kvardeko da specialistoj el diversaj landoj estis enketitaj pri la afero, inter la aliaj ankaŭ la honorofica direktoro de CED. La rezultoj de la enketo, kun tre larĝa utiligo de la respondoj donitaj de Prof. Lapenna, aperis resume en la bulteno de la Asocio (Bulletin NGO-ONG), nro 4, de Aprilo 1953. Prof. Lapenna opinias, ke la ĉefa kaŭzo de la krizo estas trovebla en la krizo de la ideo mem de internaciismo, de sincera internacia kunlaborado, unuflanke, kaj en la lingvaj malfacilaĵoj, aliflanke. Tiu ĉi opinio kun la ekspliko aperis sur la paĝo 164 de la Bulteno.

Estas menciinde, ke la Bultenon ricevas ĉiuj internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj en la mondo.

Dok. CED/3 ankaŭ en la ĉeĥa lingvo

Ni jam informis, ke la konata Dok. CED/3 aperis en presita formo en la finna kaj franca lingvoj. Nun CED permesis la presigon de tiu dokumento ankaŭ en la ĉeĥa lingvo laŭ la peto de la Esperanto-Klubo en Brno. En sia letero de la 2-a de Septembro la Klubo en Brno interalie skribas: “Ni intencas eldoni ĉi tiun

gravan dokumenton, dissendi ĝin al ĉiuj eblaj oficialaj instancoj, personoj k.t.p., kaj disponigi ĝin al la kluboj de nia lando por la sama celo.”

Ni atentigas, ke la francan eldonon oni povas mendi ĉe s-ro Albert Lienhardt, 24, Fbg. de Riedisheim, Mulhouse (Ht-Rhin), Francujo ; la saman dokumenton en la finna lingvo oni povas mendi ĉe s-ro Vilho Setälä, Irislahti, Matinkylä, Finnlando ; la dokumenton en la ĉeĥa lingvo oni mendu ĉe Esperantista Klubo, Brno, Hotel Passage, Lidicka ĉ. 23, ĈSR.

Ni ankoraŭfoje atentigas, ke ne estas konsilinde publikigi la dokumentojn de CED, ĉu en Esperanto ĉu en nacia lingvo, sen antaŭa interkonsento kun ĝia honorofica direktoro.

DONACOJ AL CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 29-an de Aprilo 1953..	158	2	2
Grupo el Angers, Francujo ..	1	0	0
S-ro Legret, Francujo ..		6	0
Felicie kaj Elly Staes, Belgujo	6	10	0
Jeanne Dedieu, Francujo ..		3	0
LKK de la Brita Esperanto Kongreso, Britujo ..	5	0	0
Prof. H. Rissom, Germanujo..	10	0	0
D-rino J. Marshall, Skotlando	1	0	0
Centra Dana Esperantista Ligo, Danlando ..	6	0	0
E. G. Lane, Britujo..		5	0
F. Epstein, Germanujo ..	1	10	0
S. kaj F. Turner, Svedujo ..	2	0	0
D-ro H. Wehrheim, Germanujo		8	0
Joel Vilkki, Finnlando ..	5	0	0
Esperanto-Grupo, Perpignan, Francujo ..	1	0	0
Stato la 8-an de Sept. 1953	£198	4	2


Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA en Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris X, Francujo, aŭ al la Centro mem.

LA MONDFEDERALISTA KONGRESO EN KOPENHAGO REKOMENDAS ESPERANTON

De la 22-a ĝis la 29-a de Aŭgusto 1953 okazis en Kopenhago granda kongreso de la Monda Movado por Monda Federacia Registaro kaj konferenco de parlamentanoj por Monda Registaro. En la nomo de Universala Ligo, kiu estas plenrajta membro de la Monda Movado por Monda Registaro, la kongreson ĉeestis Sinjorino Julia Isbrucker, vic-prezidentino de U.L., kaj Prof. D-ro Ivo Lapenna. Al la kongreso Universala Ligo prezentis projekton de Rezolucio favore al la Internacia Lingvo. La afero estis unue diskutata en la Komisiono pri Estontaj Aktivecoj la 27-an de Aŭgusto. Pledante por la akcepto de la Rezolucio, Prof. Lapenna faris en la Komisiono mallongan paroladeton, en kiu li akcentis la teknikan kaj la moralan-politikan aspektojn de la lingva problemo. La Komisiono akceptis la projekton de la Rezolucio per 10 voĉoj kontraŭ 3. La morgaŭan tagon la rekomendo de la Komisiono estis ĉiuvoĉe akceptita de la Pleno de la kongreso en jena formo :

“Estas rekomendite, ke la organizaĵoj-membroj de la Monda Movado por Monda Federacia Registaro kuraĝigu siajn membrojn kaj precipe siajn delegitojn ĉe la kongresoj lerni Esperanton.”

Estus tre utile se la landaj asocioj kaj la lokaj grupoj tuj kontaktus la respektivajn mondfederalistajn organizaĵojn kaj se, bazante sian proponon sur la menciita rekomendo, ili deklarus sin pretaj malfermi specialajn kursojn de Esperanto por la apartenantoj de la mondfederalista movado.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

La Homaro kaj la Mondbildo, de Martinus. El dana originalo tradukis C. Graversen. 124 p., prezo 6.50 d.kr. plus sendkosto. Eldonis Esperanto-Sekcio de la Spirit-Scienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago D, Danlando.

Jen filozofie-religia verkaĵo, kiu estas resumo de la instruo de Martinus, fama prelegisto kaj verkisto en Danlando. La libro celas (a) refuti la materialismon, kiu nuntempe karakterizas la pensadon de multaj sciencistoj kaj aliaj intelektuloj ; (b) starigi logikan argumenton por akcepto de la jenaj ĉef-ideoj—la universo estas vivanta tutaĵo, organismo, kiu mem estas la eterna esprim-formo de eterna Ego ; tiu Ego tra la universo diversigas sin en multajn sub-formojn, ekz. materian, bestan, homan ; tiuj sub-formoj konsistas el miriadoj da diversspecaj individuoj, ĉiuj esence vivantaj kaj en procedo de evoluado ; tamen tiu procedo ne estas aŭtomata, determinita, kvazaŭ-mekanika, eĉ ĉe “materiaj” aĵoj, ĉar tio ne akordas kun ilia vivanteco—okazas do kaj degenero kaj progreso ĉe individuoj ; la procedo havas ĉefan gravecon ĉe homaj estaĵoj, kies esenca naturo estas anima, spirita ; ilia destino estas evoluigi pere de sennombraj reenkarigiĝoj ĝis idealaj Di-similaj homoj ; la atingo de tiu destino dependas de klarvido, kompreno de la “vivmistero”, kaj preteco laŭiri la vidatan vojon.

Martinus akcentas sian estimon al ekzistantaj religioj, tamen li klare subkomprenigas, ke lia opinio ili estas mortantaj, kaj li proponas sian propran “science-logikan” religion kiel ilian eventualan anstataŭanton.

Nu, la instruo de Martinus vere estas sinkretismo. Troviĝas en ĝi nenio nova, krom la prezent-formo. Jam de multaj jaroj ĝiaj ĉef-ideoj estas bone konataj al filozofoj kaj studantoj de la religio. Plie, ĝia “logiko” ofte knaras. Tamen, supozeble ĝi havos allogon al homoj, kies mensostato kaj temperamento igas ilin impreseblaj de tia sinkretismo.

Oni devas gratuli la tradukinton, ĉar la lingvaĵo kaj la stilo estas tre bonaj. Oni volonte komentus pri kelkaj dubindaj vortuzoj kaj formoj, sed la difinita recenzo-spaco jam elĉerpiĝis.

W. J. Downes.

***Historio de S.A.T.**—Sennacieca Asocio Tutmonda, 1921-1952. 19.5 × 13 cm. 152 paĝoj. Paris 1953. Eld. S.A.T. Prezo 10ŝil., afranko 6p.

Analizanto de la evoluo de la Esperantistaj organizaĵoj troviĝas vid-al-vide de tri personoj, tre malsamaj. La unua, nome Generalo H. Sebert, kreis la unuan centron esperantistan, la faman Centra Oficejo Esperantista, en Rue de Clichy, Paris. Eliris de tiu ĉi centro montego da dokumentoj, laŭ stilo *oficiala*, vorto kiu posedis en la tiama tempo ian mistikan karakteron. Generalo Sebert

esperis, ke la ĝeneraligo de Esperanto estas esence afero registara kaj kiel ekzemplon li vidis antaŭ si la realigon de la Internacia Ruĝa Kruco. Male H. Hodler organizis la praktikantojn de Esperanto celante realigi la internan ideon, ne per predikado sed per servado. UEA kunigis progresemajn homojn ĉiaklasajn kaj ĝia supernacieco respondis al la tendenco de la Esperantismo.

La tria organizanto esperantista estis kamarado E. Lanti, kies fundamenta ideo estis forĵeti la neŭtralecon politikan de la aliaj kaj meti la lingvon je la disono de la laborista klaso. Sendube Lanti profitis de la spertoj de UEA kaj tiris konsekvencojn. Nek neŭtrala, nek supernacia aŭ internacia, sed *sen-nacieca*, estis la gvidideo.

Por bone kompreni la evoluon de SAT necesis la supra komparo de organizformoj en la komenco de la E-movado. Kiel Lanti kaj aro da kunlaborantoj sukcesis kunigi la klasbatalantajn Esperantistojn ĉi-tendencajn, tion oni povas legi en la nuna *Historio de SAT*. Forta apoganto de SAT en la komenco estis la Sovetunio, kiu tiutempe oficiale subtenis la ideon de internacia lingvo. La recenzanto havis okazon longe interparoli kun Lanti post lia vizito al Moskvo kaj li ne kaŝis la profundan seniluziigon spertitan pro la formo kiun prenis la socialismo en Sovetunio. Spite aliajn malhelpojn, SAT kreskis kaj iĝis kultura faktoro ne preterlasebla. Ĝia grava laboro en la eldono de valoraj libroj, ĝia persista penado eduki la anaron, pri ĉio tio informas la citita libro. Stilo neriproĉinda, agrabla preso kaj aro da ilustraĵoj harmonie kuniĝas por igi la libron leginda kaj posedinda.

G. Agricola.

***Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto**, de Petro Stojan. Eldonis Flandra Esperanto-Instituto. 110 paĝoj, 15.5 × 12 cm., broŝ. Prezo 5 ŝil., aŭfranko 3 pencoj.

La titolo de ĉi tiu verko vere ne klarigas la enhavon, kaj neniel indikas eĉ la ŝajnajn celojn de la aŭtoro. Li ne prezentas al ni (kiel oni povus supozi) kontinuan historion de nia movado, taŭgan por informo de (ekz.) nova Esperantisto, scivola pri la temo. Kontraŭe, li pritraktas la lingvon kaj ĝian disvastiĝon de diversflanka kaj originala vidpunkto, pravigebla nur ĉe homo, kiu studis tiujn temojn dum longa periodo laŭ propra sperto, kaj scias ĉion scieblan kaj sciindan pri ili; alivorte, spertulo de altgrada kulturo kaj erudicio.

Ĝuste tia homo estas la nuna aŭtoro; kaj tiu fakto igas la verkon elstare leginda kaj interesa. Tamen ĝi ne estas rekomendebla por la komencanto—kaj jen kial mi supre komentis pri la titolo. Ĝi estas verko por la sperta Esperantisto—precipe la Esperantologo—kiu, eĉ se li ne konsentos kun ĉio aŭ eĉ mal-konsentos kun multo en ĝi, trovos en ĝi abundon de pripensinda materialo. Mi atentigu, ke Petro Stojan estas unu el niaj plej kleraj veteranoj (li eklernis Esperanton en 1903, havante nur 19 jarojn), tre sperta lingvisto, kaj aŭtoro de multaj vortaroj kaj aliaj verkoj. La bazo de la nuna verko estas prelego kiun li faris dum la Universala Kongreso en 1925 en Ĝenevo, kaj kiu parte aperis en 1937 en *Esperanto*: tamen por la plimulto de nunaj legantoj tiu fakto ne estas grava, kaj ili povas rigardi la verkon kiel tute novan pritrakton de la temo.

En la unua parto de la verko, la aŭtoro fosas en la prahistorion, kaj skizas la originojn de la blanka raso

kaj la hind-eŭropaj lingvoj. Ne ĉiuj legantoj akceptos iujn supozojn kaj teoriojn ĉi tie prezentitajn, tamen ili estas tre interesaj. Laŭ Stojan, estis neeviteble ke Esperanto aperis en la regiono kaj periodo, en kiuj ĝi fakte aperis—kaj ĝuste pro tiuj cirkonstancoj ĝi posedas la kvalitojn necesajn por sukceso kontraŭ ĉiuj aliaj provoj fabriki internacian lingvon.

La aŭtoro kritikas multon en la lingvo, kaj en ties historio de la tempo de ĝia publika apero en 1887; li kritikas (kelkfoje akre) ĝian gramatikon, ĝian vortaron, ĝian traktadon en la manoj de certaj pioniroj. Li kritikas la malnovan Lingvan Komitaton kaj ties kondukintojn, li kritikas eĉ la Majstron mem. Tamen li ne pretendas, ke ekzistas—aŭ ke povus ekzisti—iu alia akceptinda internacia lingvo. La kritikoj venus maltaŭge el la plumo de ekstera komentisto, sed ĉar Stojan scias Esperanton ĝisfunde kaj restas plene fidela al ĝi, li rajtas esprimi siajn opiniojn—kaj la leganto povas ricevi ilin kun intereso kaj respekto. Mi mem povus sugesti, ke kelkloke li malpravas pri diversaj detaloj, kaj eĉ neintence misrepresas certajn aspektojn de sia temo; sed en mallonga recenzo komentado pri tiaj punktoj vere ne necesas. Ĉiu leganto juĝu por si mem. Tamen mi denove emfazu, ke la verko estas taŭga legaĵo nur por la pli spertaj kaj jam plene konvinkitaj uzantoj de nia lingvo.

Bernard Long.

Wie sage ich's auf Esperanto? Ins tägliche Leben geschaut und aus ihm geschöpft de Max Butin. 100 paĝoj, 16.5 × 11.5 cm., broŝ. Eld. Siegfried Ziegler Verlag, München-pasing, 1953. Prezo Gmk. 2.—

Ofte oni renkontas Esperantiston, kiu, bone parolante la lingvon, uzas de tempo aŭ tempo frazokonstruojn neĝustajn aŭ prenitajn el la propra nacia lingvo. Tio devenas ĝenerale de la plursenceco de vortoj en naciaj idiomoj.


Por helpi korekte uzi Esperanton kaj ne imiti naciaĵojn nekompreneblajn de alilandano, malnova spertulo, Max Butin, kompilis la aluditajn libron, pruvon de pacienco kaj persisto de la verkinto. Alfabeto ordigita (laŭ la germana indik-vorto) la verketo enhavas maksimumon da parolturnoj kaj frazoj, inter ili aro kiu postulas pripenson. En enira parolo la kompilinto admonas, ke oni ne evitu malfacilaĵojn, sed ke oni serĉu kaj studu.

Utila verketo, taŭga kompletigo de gramatiko kaj vortaro. Inda eksteraĵo siavice kompletigas la valoran enhavon. *H.J.*

Schlüssel zu Post la Kurso, de W. & H. Wingen. Eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn. 54 paĝoj, 21 × 14.5 cm. Prezo Gmk. 1.20.

Klubestroj ĝenerale salutos tian gvidlibron, ĉar ĝi ebligas rapidan konsulton pri la temo pristudota en la klubvesperoj. Tro ofte la kursestroj ne havas la necesan tempon prepari sin post tuttaga laboro vivtena. La aŭtoroj certe ĉerpis el siaj longaj spertoj kiel kursgvidantoj. Plue aldonitaj ekzercoj pri plursencaj vortoj en la germana estas alia signo de zorgemeco sur tiu kampo. Je la fino de la ŝlosilo troviĝas listo de kelkaj eraroj trovitaj en la kurslibro. Krom senvola uzo de germanismo aŭ diskutinda uzo de prepozicio mi ne trovis mallaŭdaĵojn. La aranĝo kaj preso estas same bone faritaj kiel en la kurslibro mem. *B.R.Z.*

Haarlem kiel kongresurbo



Granda Placo : Centro de la urbo

Apenaŭ ni estas legintaj kaj pripensintaj la impresojn de la kongreso en Zagreb, kaj jam nun niaj pensoj direktiĝas al la venontjara kongreso en Haarlem (Nederlando).

La provizorajn komunikojn vi trovas en la unua bulteno de la L.K.K. ; ĉi tie mi donas al vi kelkajn informojn pri la kongresurbo Haarlem, kiujn mi pli detale pri-skribos en la sekvontaj numeroj de nia revuo.

Haarlem estas unu el la plej malnovaj urboj en Nederlando kaj estas nuntempe la ĉefurbo de la provinco Norda Holando. Ĝi havas proksimume 170.000 loĝantojn, kaj kuŝas 20 km. okcidente de Amsterdam. Oni povas vojaĝi de tie al Haarlem per trajno aŭ per tramo en 20 minutoj.

La ĉirkaŭaĵo estas belega kaj tre varia. Oriente oni vidas la herbejojn kaj la kampojn de la antaŭa lago de Haarlem, kiu estis antaŭ 100 jaroj grandega akvo-ebenaĵo. Sude oni trovas la konatajn bulbkampojn, kiuj en la printempo altiras milojn da nederlandanoj kaj eksterlandanoj. Okcidente ni havas la arbarojn kaj parkojn de Bloemendaal (t.e. Florvalo), iom pli malproksime la vere specialan dun-pejzaĝon kaj post apenaŭ 7 km. oni alvenas al la larĝa bordo de la Norda Maro.

Sed ankaŭ la urbo Haarlem mem ofertas tre multajn belaĵojn al amatoroj de malnovaj konstruaĵoj kaj artotrezoroj.

En la mezo de la urbo, apud la granda placo, staras la preĝejo de

Sankta Bavo, el la 15a jarcento ; plue tie troviĝas la urbdomo, kies plej malnovaj partoj estas konstruitaj en la 13a jarcento, kaj la belega renesanca Viandhalo.

El la muzeoj ni devas nomi la "Frans Hals" Muzeon, kiu entenas dekojn da verkoj de la granda 17a-jarcenta portret- kaj grup-pentristo Frans Hals ; la episkopan muzeon, la "Teijler" muzeon kaj la "Van Looy" domon.

Tamen estus malĝuste, konsideri Haarlem kiel specon de muzeo, ĉar ankaŭ en la tereno de la moderna komforto oni trovas tie ĉion deziratan : butikojn kaj grandajn magazenojn de ĉiu nivelo ; hotelojn kaj restoraciojn kie ĉiu povas trovi ion laŭ sia gusto ; aŭtobusojn, kiuj portas vin rapide al ĉiuj partoj de la urbo kaj al la lokoj en la ĉirkaŭaĵo ; kaj vagonar-kunligojn, kvarfoje en

ĉiu horo, al Amsterdam kaj dufoje en ĉiu horo al Leiden, Hago kaj Rotterdam.

Por la distrado ekzistas en Haarlem mem deko da kinejoj, la urba teatro kiu havas proksimume 700 lokojn kaj la koncertejo, samtempe nia kongresejo, kiu havas entute preskaŭ 2000 lokojn.

Tre bona simfoniorkestro donas regule koncertojn de klasikaj kaj modernaj muzikverkistoj, kaj la orgeno de la Sankta Bavo, per kiu oni ludas ofte orgenkoncertojn, estas mondfama.

En la nordo de la urbo estas multaj industrioj, kaj dekoj da lernejoj de diversaj gradoj kaj teknikaj branĉoj ofertas okazojn al la junularo sin evolui.

Sekvantan fojon iom pli pri la eblecoj de la ĉirkaŭaĵo.

J.R.J.

Belarta Konkurso 1954

Ni invitas la kvinan fojon niajn verkistojn kaj artistojn konkuri en la BELARTA KONKURSO. Internacia komisiono prijuĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj kaj la prezento de la gajnintaj verkoj okazos dum la 39-a Universala Kongreso en Haarlem. Samloke okazos la prezentado de la ĉefpremia dramo. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj ankaŭ monpremion. La du sekcioj estas :

I. LITERATURA SEKCIO

1. **Originala poezio** (maksimume 108 versoj per 1-3 poemoj).
2. **Tradukita poezio** (maksimume 108 versoj per 1-3 poemoj).
3. **Originala prozo** (ĉiu prozaĵo maksimume po proks. 12000 literoj).

4. **Originala drameto** (ludodaŭro maksimume 25 minutoj).

Oni rajtas partopreni per maksimume tri (antaŭe en presa formo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe la traduka branĉo oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj laŭeble aperos en la organo "Esperanto" kaj oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto. Skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon kaj sur aparta slipo la pseŭdonimon kun via vera nomo kaj adreso, eventuale kun via kongres-numero aŭ kun membromarko de U.E.A. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj. Sendu 5 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la traduka branĉo ankaŭ 5 ekzemplerojn de la originalo.

II. SEKCIO DE ARTO GRAFIKA KAJ PLASTIKA

1. **Desegno de Esperanta afiŝo** en formato 45 × 65 cm. La desegno havu maksimume tri kolorojn. Sola teksto estu la vorto ESPERANTO kun eventuale LINGVO INTERNACIA. Ie sur la bildo oni lasu spaco(j)n por surpriso de nacilingva informa teksto.
2. (a) **1-3 ilustraĵoj** por Esperanta(j) verko(j) de prozo aŭ poezio.
(b) **Desegno por kovrilo** de iu Esperanta verko kun indiko pri la maniero de bindo aŭ broŝurigo.

La bildoj en branĉo 2 (a kaj b) estu en dimensioj duoblaj rilate al la presformato.

Ĉiu konkursanto rajtas partopreni per maksimume 3. provoj en ĉiu branĉo (en 2a la maksimumo do estus 9 bildoj !)

Subskribu viajn verkojn per pseŭdonimo kaj sur aparta slipo en la sama pakaĵo notu la pseŭdonimon, vian efektivan nomon kun adreso kaj eventuale kongresnumeron aŭ U.E.A.-membromarkon.

La bildoj restos propraĵo de la aŭtoroj, kiuj rericevos ilin per rekomendita poŝto. Sendu ilin sammaniere.

Speciala komisiono prijuĝos la verkojn, kiuj estos ekspoziciataj dum la Universala Kongreso en Haarlem.

ĜENERALAJ REGULOJ POR PARTOPRENO

1. Ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 39-a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de U.E.A. (ĉu rekte ĉu per "adopto").

2. Sendu ĉion al la peranto, S-ro Ken Lawrence, 244 Quinton Road,

Birmingham 17, Anglujo. La peranto havas la devon konservi la anonimecon de la partoprenanto.

3. La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 31-a de marto 1954 por la Literatura Sekcio, kaj la 15-a de junio 1954 por la Grafika Sekcio.

4. Konkursa kotizo (sendepende, ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj en unu sekcio) : por britoj : 1 ŝilingoj 6 pencoj. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponon : 3 respondkuponoj (maldekstre stampitaj) aŭ malpli laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas malpermesita, la partopreno estas senpaga.

F. Szilágyi, Sekretario.

INFANOJ ' KAJ PATRINOJ

de

Dorothy Canfield Fisher

(trad. T. J. Gueritte)

Racia, nescienca, rigardo al patrineco, interesa al patr(in)oj de infanoj ĉiuagaj.

175 pagoj - tole bindita
5 ŝil. - aŭfranko 6 p.

Eldonita de

The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Mendu ĉe

**U.E.A., Heronsgate,
Rickmansworth (Herts.)
Anglujo**

Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimatajn opiniojn.



UNO kaj UNESKO

En la diskuto pri ĉi tiuj nomoj aperis jam multaj diversaj kaj parte strangaj argumentoj, kvankam la problemeto devus esti sufiĉe facile solvebla per iom da logiko.

La diversaj nacioj aliĝintaj al UNO ne estas unuigitaj (fare de iu alia) sed libervole unuigis sin, t.e. unuigis en tiu tutmonda organizaĵo. Sekve la logika formo de la plena nomo de tiu organizaĵo en Esperanto povas esti nur *Unuiĝintaj Nacioj*. Tamen, se iuokaze gravus eviti la supersignon, apenaŭ gravus, se oni uzus la formon *Unuigitaj Nacioj*, kiun ja neniu miskomprenus.

Nuntempe oni multe uzas mal-longigitajn nomojn de organizaĵoj k.t.p., formitajn el la komencliteroj de la vortoj konsistigantaj la plenajn nomojn. En Esperanto ni havas precedencon en la malnova kaj tre praktika formo *Usono*, formita el la komencliteroj de *United States of North America*, kio donas la formon *Usona*, kiun oni esperantigis, ŝanĝante la finan *a* al *o* por fari ĝin Esperanta substantivo. Por ke tiaj mal-longigitaj nomoj estu praktike uzeblaj, ili devas esti prononceblaj, kaj en Esperanto ili devas obei al la gramatikaj reguloj de la lingvo. La mallongigo de *Unuiĝintaj Nacioj* estas *UN*, al kiu oni aldonu la substantivan finaĵon *O*, t.e. *UNO*. Ĉu oni skribas tion *UNO*, ĉu *UNo*, tio apenaŭ gravas. Sed la formo *OUN* ne estas praktike uzebla en Esperanto.

En la julia numero de *Esperanto* D-ro Solzbacher skribas, ke la formo *UNESKO* en Esperanto apartenas al la sama kategorio kiel la skribado de *Ĉerĉil*, *Ajznhauŝer* kaj *Ŝajo-Palaco* por *Churchill*, *Eisenhower* kaj *Palaco de Chaillot*. Tio ne povas esti ĝusta. La formo *UNESKO* apartenas al la sama kategorio kiel *USONO*. *UNESKO* ne estas nacilingva propra nomo, sed praktika artproduktaĵo. Ne gravas el kiuj anglalingvaj vortoj tiu nomo estas formita; gravas sole, ke oni ĝin prononcu *unesko* kaj ne *unestso*, sekve la logika formo en Esperanto povas esti nur *UNESKO*.

C. Stöp-Bowitz, Norvegujo.

Membro de la
Akademio de Esperanto.

Ŝtatestroj kaj Esperanto

Mi ĵus ricevis n-ro 572-3 de jul./aŭg. 1953 de *Esperanto*. Je la paĝo 221, sub la titolo: *Marŝalo Tito, Esperantisto!* estas dirite "Tiu verŝajne estas la unua fojo en la historio, je kiu ŝtatestro akceptis delegitaron de esperantistoj".

Ne, ne estas vere! Mi kompreneble gratulas la samideanojn kiuj sukcesis esti ricevataj de Marŝalo Tito, sed tiu ne estis la unua fojo en la historio k.t.p., ĉar Lia Ekscelenca Moŝto Luigi Einaudi (Prezidanto de Itala Respubliko) bonvolis akcepti oficiale delegitaron de Esperantistoj en septembro 1952 (vidu n-rojn de januaro kaj februaro 1953).

Otello Nanni, Italujo.

E. Motillon :

En la lando de la kasteloj

Touraine, tre bela provinco ĉirkaŭ Tours en Centra Francujo, trafluata de la riverego Loire kaj de ties alfluantoj, Cher, Indre, Vienne, ricevis du kromnomojn montrantajn ĝiajn ĉefajn ecojn: “Ĝardeno de Francujo” kaj “Lando de la kasteloj”.


Ĝia pejzaĝaro konsistas jen el beletaj riveroj, jen el malaltaj montetoj limigantaj riĉajn ebenaĵojn, jen el arbaroj, jen el diverskoloraj kampoj similaj je ŝaktabulo, jen el fruktoĝardenoj, jen el vitejoj. Ĉie vidiĝas floroj: sur la kampoj, sur la muroj, ĉe la piedo aŭ sur la fenestroj de graciaj vilaĝaj dometoj.

Kie ajn oni vagas tra tiu bela “ĝardeno”, ĉe la supro de monteto, en mezo de plej plaĉa pejzaĝo, tie aperas kasteloj, mezepokaj fortikaĵoj, nobelsinjuraj loĝejoj aŭ reĝaj palacoj. Vizitante tiun senkomparan kastelaron, oni povas sekvi seninterrompe la evoluadon de la arkitekturaj stiloj dum pli ol sep jarcentoj. Post vizito,

eĉ rapida, al Touraine, venas tute nature en la menson la vortoj “lando de la kasteloj”.

La vizito al tiuj kasteloj postlasas neforgeseblan memoraĵon. La mezepokaj fortikaĵoj kiaj Luynes, Langeais, Saumur, Chinon, impresas kiel atestantoj de la tiamaj luktoj, kaj eligas senton de superaj fortoj kaj potenco. Aliaj kasteloj konstruitaj dum la 17a kaj 18a jarcentoj (inter ili Cheverny, Valençay) estas plej puraj ekzemploj de tiu klasika stilo, eble iom severa, sed grandioza kaj majesta. La plej belaj el tiu kolekto de kasteloj estis konstruitaj dum la 16a jarcento, kaj sin lokas inter la plej admirindaj ĉefverkoj de la Renesanca epoko. Iliaj nomoj: Amboise, Bloise, Azay-le-Rideau, Chambord, Villandry, Chenonceau... neeble citi ĉiujn en tiu mallonga artikolo.

Por plene ĝui la belecon de tiuj ĉefverkoj de la konstrua arto, estas



Kastelo de Chenonceau iluminata

necese vidi ilin nokte. Jes, nokte, ĉar dum la tuta somero la kasteloj kaj la pli vidindaj monumentoj de Touraine estas iluminataj ekde la 21a horo ĝis noktomezo. Reflektoroj arte dismetitaj inundas ilin per milda blanka lumo. Kaj aperas detaloj neviditaj dum la tago. Lumo kaj ombro plireliefigas la skulptaĵojn. Ĝi estas neforgesebla kaj neimagebla spektaklo.

Tridek kvar historiaj kasteloj kaj multaj aliaj monumentoj lumas ĉiunokte en la Turena nokto. Aŭtobusaj ekskursoj estas organizitaj kaj ebligas la turiston ilin vidi.

Mi provu rakonti pri unu el tiuj noktaj promenadoj

En Tours. Estas la 20.30 horo. En la komfortan aŭtobuson envenas turistoj parolantaj ĉiajn lingvojn—ankaŭ la Esperantan. Noktiĝas. Unu post alia, kvazaŭ oraj najloj, aperas la steloj en la malhela ĉielbluo.

Post nelonge ni eliras el la urbo. Super la malhela amaso de la ardezaj tegmentoj, elstaras la 70-metrojn altaj turoj de la katedralo. Ili elradias per blanka, nereala lumo. Ili aspektas kvazaŭ aranea punto el diafana, etera lumo ŝprucanta alten en la ĉielon.

Ni veturas laŭ la bordo de la riverego Loire. Jen antaŭ ni aperas blanka lumo. Ĉu jam ektiĝas? Subite, post turniĝo, la aŭtobuso haltas. Admiraj ekkrioj eliras el la buŝoj. Kia neatendita, mirinda spektaklo! Ĉe niaj piedoj fluas la rivero, kies tremantaj ondetoj estas traŝirataj de dolĉaj rebriloj. Supre malhela roka amaso ŝirmas aron da domoj. Kaj kronante la tuton, la reĝa kastelo Amboise baniĝas en aero dolĉa kaj luma. Apud alta dika turo delikate reliefigas eleganta balkono kaj artaj skulptaĵoj de

belega renesanca fasado.

Dum la tuta veturo surprizo sekvas surprizon kaj miraĵo sin montras post miraĵo. Sed eble la mirindaĵo el tiuj mirindaĵoj estas Chenonceau. Kiam oni haltas antaŭ la kastelo, ne aŭdiĝas plu admiraj aŭ surprizaj krioj. Kvazaŭ religia silento momente regas antaŭ la impona vidaĵo. La rivero Cher rebrilas kiel milfaceta diamanto. Ĝiaj ondoj fluas sub la kastelo tra grandaj volboj kaj malaperas trans la ĉefa fasado konstruita super la rivero. La alia fasado staranta sur la bordo de la rivero fronte de ni brilas pro la lumo de nevideblaj reflektoroj. La noblaj arkitekturaj linioj de la kastelo aperas kun nepriskribebla beleco sur la malhela fono de la nokta pejzaĝo. Ni eniras en la parkon. Subite, la aspekto de la kastelo ŝanĝiĝas. Jen lumo neatendita montras ĝis nun nevideblan detalon, jen ombro aperas sur ĝis nun plenuma parto. Mistera emocia muziko aŭdiĝas, voĉoj de eminentaj artistoj eksonas. Neeble ne senti la ensorĉon de tiu artoplana miraĵo en kiu lumo kaj sono miksiĝas en nedirebla harmonio. Dume, kontrastas la ĉirkaŭanta mallumo.

La reira vojo al Tours estas same ensorĉa. La iluminataj kasteloj staras en la nokto kvazaŭ luminsuloj. Kaj foje, ĉe turniĝo de la vojo, aperas en la malhelo lumanta sonorilejo de kampara preĝejo aŭ kapeleto kaŝita meze de l' arboj. Kaj la turoj de la katedralo baldaŭ aperos el la malproksimo, signante la finiĝon de nia veturado

Por ricevi informojn pri la kasteloj de Touraine, oni sin turnu al Syndicat d'Initiatives, 88 rue Nationale (al kiu ni tre dankas pro permeso reprodukti la ilustraĵojn), aŭ al Sinjoro E. Motillon, 10 Place du 8-Mai, TOURS (I. et L.), Francujo.

Felix Timmermans :

En nokta horo

LA domo estis plena je silento kaj nigra mallumo. Marko, la dompentrismo, dormis je la flanko de sia malsana edzino, kiu en la mateno ricevis la sanktoleadon.

La filo dormis en la mansardo, kaj la du filinoj malsupre, en la malantaŭa ĉambro. Ili dormis kun malfermitaj pordoj, por ke ili vekiĝu, tuj kiam la patro vokos.

Ili ĉiuj estis endormiĝintaj kun okuloj ruĝaj pro plorado. Laŭ la kuracisto ili nur malmulte povis esperi resaniĝon. Sed, se la malsanulino ĝisvivus la mateniĝon, ŝi tamen povus esti savita. Ili estis preĝintaj antaŭ la ikono de Nia Kara Sinjorino; la kandeloj jam forbrulis. Super la mallumaj, kaviĝintaj ŝtuparoj iliaj odorstrioj ankoraŭ pende ŝvebis supren. Ekstere la neĝo tute mallaŭtigis ĉiun bruon.

Estis silente ene kaj ekstere.

Marko kuŝis flanke de ŝi, kaj provis resti maldorma pere de preĝado kaj per observado de la ombroj, moviĝantaj pro la flagranta noktolumeto. Sed kontraŭvole li endormiĝis. Kaj la morto venis rigardi tra la fenestro. Ĝi blovestingis la lumeton, poste haltigis la vekhorloĝon.

Estis mallume kaj senbrue en la domo.

Subite Marko ekskuigis, duonvekiĝis kaj demandis: “Rozo, ĉu vi ion diris?”

Rozo ne respondis, kaj dum li provis resti maldorma je unu okulo—je ambaŭ li ne povis—li ree endormiĝis.

Malrapide plupasis la nokto, plena je silento kaj mallumo.

Kaj denove li ekskuigis. “Rozo, kio estas al vi? Ĉu vi deziras iom trinki?”

Rozo silentis.

Pro sento de malseketa malvarmo eta tremado trakuris lian korpon kaj li tute vekiĝis. Per la okuloj li serĉis la lumeton; ĝi estingiĝis. Li provis aŭskulti la vekhorloĝon; ĝi jam haltis. “Rozo, Rozo, kio okazis?” Rozo ne respondis.

Subite li sentis, kiom malvarma estas la edzino. Li palpe tuŝis ŝian brakon, malvarman kiel marmoro. Li side rektiĝis kaj, kliniĝante super ŝian kapon, aŭskultis ŝian spiron. Ŝi ne plu spiris. Tiam li komprenis, saltis el la lito, eklumigis la ĉambron por vidi—sed li fermis la okulojn. Li ne kuraĝis rigardi. Li palpe serĉis ŝian manon, surgenuis antaŭ la lito kaj kisis ŝiajn malvarmajn fingrojn. Plorĝemo sufokiĝis en lia gorgo. “Rozinjo, Rozinjo!” Liaj larmoj ekfluis, pendiĝis sur siaj fingroj.

La infanoj! La infanoj! Li pensis pri la infanoj kaj abrupte li ekstaris, iris al la pordo, kaj lia buŝo jam malfermiĝis por voki la infanojn, kiam el la turo sonis la tria horo. Li metis la manojn antaŭ la okulojn. La tria!

“Dio, kiom frue ankoraŭ”, li ĝemis, “ne, ne, mi lasos la infanojn pludormi ĝis la sepa, kiel ordinare. Tiel ili havos kvar horojn malpli da ĉagreno en sia vivo.”

Kaj li fermis la pordon, ree rampis en la lito ĉe sia mortinta edzino, kie li restis kuŝanta—ĉifonita homaĉo ploranta.

La porketo

PATRO promenis kun siaj filinetoj Anjo kaj Manjo tra la kamparo.

Kaj jen, de malantaŭ malnova, malpura porkejo aperis roz-haŭta porketo.

Atente kaj silente la du knabinoj rigardis ĝin.

Diras Anjo : “Patro, kial la porkoj iras nudkorpaj ?”

“Ĉar ili ne havas harojn”, respondas Manjo.

“Ili havas”, diras la patro, “vidu, jen unu kaj jen ankoraŭ unu, kaj tie, mi opinias, ankoraŭ unu.”

“Ne valoras nomi tion haroj”, diras Manjo.

Kaj denove demandas Anjo : “Kial porko iras nudkorpa ?”

“Kaj kial ĝi iras piedpinte ?”, demandas Manjo.

“Kaj kial ĝi havas rostran buŝon ?”

“Kaj kial ĝiaj okulaj similas tiujn de plorinta infano ?”

“Kaj kial ĝi havas buklan vosteton ?”

Kaj la patro elpensas jenan :

* * *

Post kiam la bona Dio kreis la bestojn, ili ĉiuj estis tute nudaj. Tamen Li intencis, kun helpo de la anĝeloj, en la sama tago havigi al ili vestojn kaj kolorojn, al ĉiu laŭ sia speco kaj naturo. Kaj la bestoj viciĝis honeste kaj orde, pacience atendante sian vicon.

Sed la porko, avida je manĝaĵo ekde la komenco, jam estis elviciginta sin. Flarante la teron ĝi alvenis en arbaron kaj tuj komencis apetite manĝi, ĝuante la molajn, sukoplenajn radikojn, tuberojn kaj bulbojn. Kiam ĝi estis satmanĝinta, ĝi tre kontenta ekkuŝis dorsen por iom dormi, la kvar piedetojn supre.

Nur kiam la suno estis subironta ĝi vekiĝis, kaj subite memoris la vestadon de la bestoj. Ĝi kuregis al la loko kie ili ricevas vestojn. Kaj ĝi renkontis multajn bestojn, ĉiuj bele vestitaj kaj konvene kolorigitaj, ĉiuj diverse kaj bone rekoneblaj unuj de la aliaj.

La ŝafo havis blankan ĉemizeton el bukla lano, la azeno grizan veston kun bruna kruco sur la dorso, ĉar poste ĝi devos porti la Sinjoron tra Jerusalemo. La leono estis vestita per kolharoj, similantaj palmfoliojn, la bovo havis grandajn makulojn blankajn kaj brunajn, la tigro estis nete striita ambaŭflanke, dekstre kaj maldekstre absolute same. Eĉ la rano, kiu ne povis decidi, ĉu li vivos en aŭ ekster la akvo, surhavis streĉe almetiĝantan veston, ornamitan per ĉiaj strangaj figuretoj. La hundo havis harojn laŭplaĉe ; iuj longajn, aliaj mallongajn. La kapro portis barbeton ĝuste kiel urba skribisto, kaj la virkoko estis ricevinta tiom da belaj plumoj, ke ĝi ne sciis, kie loki ilin ; tial ĝi metis la plej longajn sur la dorsan finaĵon. Kaj la birdoj, ĉiuj birdoj ! Eĉ en plej rava sonĝo oni ne povas imagi al si la belecon de iliaj vestoj !

Vi do komprenos, ke la porketo rapidegis por ankaŭ akiri tian belan veston. Senspira ĝi alvenis al la jam dezerta placo.

Sed ho ve ! Kiom konsterniĝis la bona Dio, kiam Li vidis la porkon alvenante tute nuda ! Ĉar ĝuste Li jam sidis kun ĉiuj siaj anĝeloj sur nubo por ŝvebe flosi returne al la ĉielo, kaj la farboskatolo estis elĉerpita, ĝisfunde elĉerpita, kaj la lankesto estis malplena, tute malplena. Li kunfrapis la manojn. Ho, kion fari ?

“Tro malfrue vi venas”, la bona Dio diris al la porketo, “rigardu la farboskatolon. Helpe de pligrandiga lenso vi ja ne trovos guteton, eĉ la penikoj estas lavitaj en la fosaĵo, kaj ĉiom da lano estas foruzita. Ho, nur vi iros nuda! Porko, ho porko, kial vi elviciĝis?”

Intertempe anĝelo jam estis puŝanta per sia ŝultro kontraŭ la nubo por ekmovi ĝin, sed la porko komencis plori kaj krei. Ĝi ploradis kaj kriadis tiom forte, ke ĝia buŝo longiĝis, ĝiaj okuloj enprofundiĝis en la rostron kaj la bona Sinjoro mem tuj paliĝis, tute paliĝis. Li tiom deziris helpi la porketon, precipe ĉar subite ĝi ja estis tiom malbeliĝinta. Jen Li staris, per la manoj tordante al Si la orajn harojn.

Kaj dume la porketo seninterrompe kriis: “Mi estas nuda, nur mi estas nuda. Neniu ornamaĵo estas sur mia korpo! Kaj per bagatelo mi ja estus kontenta!” Sed tiu kriadado havigis al la bona Dio nek farbojn nek lanon. Nur kelkajn fortikajn penikharojn Li povis planti en la nudan haŭton de la kompatinda porko.

Pro bedaŭro la bona Dio volvis siajn harojn ĉirkaŭ fingro. Kaj vidu: bela, longa buklo pendis ĝis sur Lia ŝultro. En la sama momento la mizera, tro malrigida vosteto kaptis Lian atenton—kaj vere bela ideo saltis al Li en la kapon.

“Venu tien”, Li diris, kaj Li prenis frizilon, per kiu Li estis frizinta la harojn de la ŝafo kaj de la aliaj bestoj, kaj varmigi ĝin kontraŭ la unua stelo, kiu ekbriletis sur la blua ĉielo, kaj la malbonaspektan vosteton Li frizis en elegantan, fortikan buklon.

“Mi ne povas fari ion plu”, la bona Dio diris, “mi ne povas ja bukligi viajn piedojn”.

Kaj la porko rigardis malantaŭen por vidi sian vosteton, kaj ĝi trovis ĝin tiom bela, ke ĝi gruntis pro gajeco. Kaj la porko estis tiom fiera pri ĝi kaj tiom paradema, ĝi ekiris piedpinte, kiel riĉa sinjorineto kun nova ĉapelo.

Ambaŭ rakontojn esperantigis el la flandra lingvo Chr. F. W. Slijper. (El “Het keerseken in de lanteern”. Eldonis P. N. van Kampen en Zoon, Amsterdam, Nederlando.)

LA TAGO DE LA UNUIĜINTAJ NACIOJ

La 24-an de Oktobro oni festos en la tuta mondo la Tagon de Unuiĝintaj Nacioj. La celo estas popularigi la Organizaĵon per prelegoj, prezentado de filmoj, artikoloj en gazetoj kaj revuoj ktp. En diversaj landoj jam komenciĝis la preparlaboroj por tiu festo. Ankaŭ la Esperanto-organizaĵoj en pluraj lokoj estas invitetaj kunlabori.

Ni varme rekomendas al ĉiuj landaj asocioj kaj al ĉiuj lokaj grupoj partopreni en la festo de tiu tago kaj laŭ ebleco kontribui, por ke ĝi sukcesu kiel eble plej kontentige. La lokaj grupoj povus en ĉiu okazo organizi specialajn kunvenojn aŭ la 24-an de Oktobro aŭ en iu tago proksima al tiu dato. Oni okazigu almenaŭ prelegon pri U.N. kun diskuto post la prelego. La prelegantoj povas eventuale utiligi la materialon pri Unuiĝintaj Nacioj, kiu troviĝas en la verko “Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo”.

*Prof. I. Lapenna,
Estrarano pri Eksteraj Rilatoj.*

Romano de Veteranaj Geedzoj

1905 kaj 1907

Antaŭ preskaŭ kvindek jaroj
juna Belga blondulino
rekrutiĝis, kaj fariĝis
sperta Esperantistino.

Ĉirkaŭ tiu tempo vivis
trans la maro juna Brito :
fervorege Esperanton
li studadis—eĉ en lito !

1911

Brito kaj Belgino iris
al Kongres' en Karloreĝo.
Li sin trovis apud ŝi
side sur proksima seĝo.

Belgo, kiu konis ambaŭ
tuj prezentis lin al ŝi—
amikiĝo Esperanta !
Interrasa harmoni' !

Ili kamaradis kune
ĝis la bela kongresfino.
(Kaj ilian kunan vivon
jam aranĝis la Destino !)

1911–1914

Dum kvar jaroj la amanto
trans la maron ofte iris ;
ĉar tre forte la alloga
“Magnetino” lin altiris.

1914—*Mehleno*

Rekuniĝo aranĝita :
“Ĝis revido en Parizo !”
ejo de la tiujara
Esperanta Paradizo !

Ve ! Ne povis kunvenadi
tie la kongresanaro,
ĉar ekflamo de milito
tuj fariĝis kontraŭbaro.

1914–1918

Ofte ili interŝanĝis
amleterojn sekretvoje.
Amikin' en Nederlando
peris ilin ĉiufoje.

Armistico

Armistico ! Feliĉego
gefianĉa, ĉe l'alveno
de l' fianĉo, nun serĝento
ree nun en Antverpeno.

Pro dektaga forpermeso
por edziĝo, mielluno,
ili trovis sin finfine
favorataj de l' Fortuno !

* * *

Tio estas la romano
de ni du, geedza paro ;
unu el la granda nombro
en la Esperantistaro.

Dum la jaroj de kunvivo,
Nunmomente tridek kvar*
ekskluzive Esperanton
ni parolas hejme, ĉar

Danke al la kara Majstro,
kies lingvo vokis nin
al la amo kaj edziĝo,
ĉiam ni benegas lin !

* * *

*Ĉu rekordo estas nia ?
Ĉu superas ĝin alia ?
Ni atendas !

John P. Nix, F.B.E.A.

Noto : S-ro Nix (adreso : The Hundred, Romsey, Anglujo) edziĝis kun F-ino Gabrielle Herickx (Antverpeno) 25 jan. 1919.

D-ro Hess : tradukis Willi Köhler.

Vetero, Luno kaj Planedoj !

“**N**UN la vetero baldaŭ ŝanĝiĝos kaŭze de lunŝanĝo”, ofte elparolas nefakuloj. Kiu kelkfoje pravis per jena prognozo, tiu nepre estonte emas fidi al tiu-ĉi simpla metodo. Sed kiel nun prijuĝas la scienculo, la meteorologo, jenan vulgaran opinion ?

Estas tute kompreneble, ke ankaŭ la scienca meteorologio okupiĝis pri la esplorado de la laŭdiraj interligoj inter lunfazo, planedpozicioj kaj veterkaraktero, ĉar estus granda faciligo por la prognozado, se estus eble apliki tiaspecajn simplajn metodojn por konciza prognozo. Ĉar tiukaze la meteorologo povus anticipi indiki la vetersituacion por monatoj kaj jaroj same tiom ekzakte, kiel la astronomo antaŭe prikalkulas la planedo-moviĝojn kaj eklipsojn. Sed serio da detalaj esplororezultoj kun la gravaj elementoj meteorologiaj nome : precipitaĵo, ĉielkovraĵo, temperaturo k.t.p. el la plej diversaj teritorioj de nia globo bedaŭrinde indikis, ke ne ekzistas citinda kaj uzebla interligo inter luno, planedoj kaj klimato. Plenrezulta kunmetaĵo de Prof. Baur ekz. montris, ke dum la tempo de 1881–1930 oni observis en Frankfurt-apud-Majno dum kreskanta luno 1523, dum mal-kreskanta luno 1518 serenajn tagojn kun maksimume 2/10 da ĉielkovraĵo. La diferenco inter la du nombroj estas tiom eta, ke ĝi tute rilatas al normalaj variumaj limoj ! Rilate la duonon de ĉiuj kazoj do estas ĝusta tia prognozo, sed ne rilate la alian duonon. El la registrado de la tagoj kun precipitaĵo en Würzburg evidentiĝis, ke la varieco de la nombro

de tiaj tagoj inter la templimo tri tagojn antaŭ kaj tri tagojn post plenluno nur atingis 5%, kio do nepre koincidas kun la varioma limiĝo de la hazardo. Dum plenluno plue sumiĝis la frekvento de sentebla temperatura ŝanĝiĝo je 12.5%, dum novluno je 12.7% kaj en la inter-tempoj same 12.7%; do ne estis konstatebla la plej eta influo de lunfazoj al veterkaraktero. Kiam oni do bazas prognozon nur sur la observado de la lunfazoj, tiam ĝi estas ĝusta je 50% kaj malĝusta je 50%, kiel tio estas la normo rilate prognozojn pure hazardajn. Sed ankaŭ sen la serioza pruvo de la nombroj la scienculo devus konkludi, ke veterinfluo per luno kaj planedoj ne estas ebla, ĉar la energiefektoj kaŭzataj flanke de astroj al la atmosfero tute ne estas konsiderindaj kompare al energia alprovizado de la suno, kiu sole determinas la veter-evoluon rekte aŭ nerekte. La preteksto, ke la luno fakte ja influas dum la tajdo la multe pli pezajn akvokvantojn de la oceanoj kaj ke ĝi do eĉ pli devus esti kapabla movi la pli malpezajn aerkvantojn, estas erara. Ĉar la efiko de la maso estas proporcia al la maso mem, ĝi sekve devas esti eĉ miloble pli eta rilate al aero estante miloble pli malpeza ol akvo.

Tian etan influon oni povis konstati ankaŭ per komplikaj analizoj de aerpremaj linioj surmapaj de diversaj stacioj. Rezultiĝis iniciatitaj pere de la luno aerpremo-variigoj de unu centono de milibaro. Sed kiam oni pripensas, ke la ĉiutagaj, sole globe kaŭzitaj aerpremo-varioj atingas la

centoblon ĝis miloblon de ĉi tiu nombro, tiam estas evidente, ke tia eta influo estas sensignifa por la vetero.

Sed kiel do kredas sennombraj homoj konstante al la influado de luno kaj planedoj al la vetero? Tio estas psikologia problemo. Neniu kredo havas radikon tiom profundan kiel la superstiĉo; oni kredas al luninfluo, ĉar oni *volas* kredi al ĝi. En nia ŝanĝigema klimato aliĝas la veterokazaĵo meznombre post po 4-5 tagoj, do ĉiam okazos plejverŝajne veterŝanĝigo en periodo de 3 tagoj antaŭ kaj ĝis post plenluno resp. novluno, kiun oni atribuas erare al la luno. Ke ekstere de la lunfazo okazas same tiom ofte veterŝanĝigoj oni fakte nek priatentas nek konsideras, ĉar ne interesas. Por la naturhomo ja estas vere simple, interrili la ŝanĝigon de la vetero kun la ŝanĝigo de la lunfazo kaj planedsituacioj. Tamen oni devas pripensi, ke en teritorioj kun konstante sama klimato, ekz. inter la tropikoj aŭ en la interno de Azio, neniu homo ekkaptas la hipotezon atribui al la luno veterinfluan, kvankam ankaŭ tie la lunfazo estas ekzakte atentataj. Sed kial do la luno nur ĉe ni en la zonoj moderaj povus destini la klimaton, sed pruveble ne en aliaj teritorioj?

Finfine ankoraŭfoje estu akcentate, ke neniu alia pli bedaŭras la mankon de reciprokeco inter luno, planedoj kaj vetero ol la meteorologo, eĉ se tio ŝajnas nekredebla al la laiko. Kiom simpla ja estus lia laboro, se dum prognozado nur necesigus priatenti la lunfazon.

*Originalo de D-ro Hess,
Centra Instituto Meteorologia,
Bad Kissingen, Germanujo.*

La lingvaj malfacilaĵoj kiel kaŭzo de la krizo de internaciaj kongresoj

La tre grava bulteno de la Unio de Internaciaj Asocioj "Bulletin NGO-ONG" publikigis en la n-ro 4, de Aprilo 1953, la rezultojn de la enketo, kiun faris tiu Asocio pri la krizo de internaciaj kongresoj. Sur la paĝo 164 de la menciita bulteno oni povas legi pri tio jenon:

"La ĉefa kaŭzo de tiu ĉi krizo troviĝas, laŭ mia opinio, en la krizo de la ideo mem de internaciismo, de sincera internacia kunlaborado. Saman gravecon havas la lingvaj malfacilaĵoj. Hodiaŭ estas uzataj en la internaciaj kongresoj tiel multaj lingvoj, ke nur la personoj, por kiuj tiuj lingvoj estas gepatraj kuraĝas esprimi sin libere, dum la aliaj limigas sin al pasiva aŭskultado, al studado de antaŭe preparitaj raportoj kaj tute okaze al mallongaj intervenoj, faritaj kun la sento de inferioreco, karakteriza por tiuj, kiuj parolas fremdan lingvon. Ĉio ĉi rezultigas preskaŭ kompletan foreston de debato kaj mankon de kontaktoj inter la membroj de la kongresoj. Plua rezulto estas, ke oni klopodas eldoni kiom eble plej multe da dokumentoj. Ili estas hodiaŭ tiel multnombraj, ke estus pli korekte paroli pri kongresoj de paperoj ol pri kongresoj de homoj. La viva parolata vorto estas anstataŭigata per la morta vorto, presita aŭ tajpita. Kelkfoje la kvanto de dokumentoj estas tiel granda, ke oni ne povas trovi tempon por trarigardi ilin dum la kongreso, ankoraŭ malpli por legi ilin atente... La utiligo de unu sola, neŭtrala lingvo havas bonegajn rezultojn ne nur el psikologia vidpunkto, sed ankaŭ pro pure teknikaj konsideroj. Multe pli da laboro povas esti realigita en multe pli mallonga tempo."

Erika Linz :

La luphomoj de Sudameriko

HIERAŬ HARRO kaj mi vizitis la unuokulan Johanon. Ni interbabilis tre vigle kun li kaj lia maljuna edzino kaj iĝis tre malfrue. Sed neniel gravis ĉar estis nokto ĉirkaŭ la tempo de la plena luno kaj tiuj noktoj estas ĉi tie tiom helaj ke oni bone vidas.

Johano estas maljuna ĉasisto kaj kiam li estas bonhumora li rakontas multajn ĉastravivaĵojn en tre amuza maniero. Cetere sian okulon li perdis dum ĉaso.

Ni sidis kiel ĉiam sur la 10 cm. altaj benketoj ĉirkaŭ la fornofajro, kiu estis ankaŭ la sola lumofonto. "Sinjoro Johano, rakontu ion!" petis Harro post paŭzo en la babilado. Malrapide la maljunulo ekbruligis la memkulturitan tabakon en sia malgranda pipo per ardopeco el la forno kaj rigardis dum kelka tempo en la fajron...

"Kiam mi estis junulo," li komencis, "mi iam trairis kun amiko dum kelkaj tagoj la altan praarbaron sur la montaro. Poste ni ĉasis grandan tapiron, sed en la unuaj tagoj ni renkontis nenian ĉasbeston. Tranokti sur la tero estas multe tro danĝere tie. Ni ĉiam dormis sur arboj. Iun vesperon ni jam sidis sur la arboj. Estis luna nokto kiel hodiaŭ. Subite krakis proksime branĉetoj. Ni ekprenis niajn pafilojn senbrue ĉar ni supozis, ke estas jaguaro. Sed ne estis tio. Alproksimiĝis grandega griza hundo sed per stranga irmaniero: ĝia postaĵo estis pli alta ol ĝiaj ŝultroj. Antaŭ ĝia buŝego estis ŝaŭmo. Mi pensis, ke ĝi certe estas rabia kaj volis ĝin mortigi. Vidante tion, Benedito prenis mian brakon kaj flustris: 'Pro Dio! Ne pafu!' Lia

voĉo sonis tiom ekscitite, ke mi vere ne pafis, sed rigardis lin en surprizo. Li prenis branĉon kaj batis per ĝi la hundon. Tiu levis la kapon, turnis sin kaj forkuris sen ia sono. 'Alportu morgaŭ salon en la kabanon sur la altaĵo!' kriis post ĝi Benedito. Mi jam preskaŭ opiniis, ke Benedito estas rabia. 'Kial do mi ne mortigu rabian hundon, Benedito?' mi demandis.

"'Homo, ĉu vi ne vidis? Tio estis luphomo! Ĉu iam hundo iras tia maniere, kun la postaĵo pli alte ol la ŝultroj? Ĉu vi ne vidis ke ĝi forkuris silenta kiam mi batis ĝin? Hundo grumblus. Hodiaŭ estas vendredo. Lunde kaj vendrede la luphomoj devas transformi sin kaj kuri laŭ sia sorĉa destino trans sep vojkruciĝojn, viziti sep bienegojn, kaj sep kokinejojn, kaj se ĝi renkontas infanon survoje ĝi devas ĝin manĝegi! Ĉu vi tion ne scias? Ha, vi vidos! Mi ja ordonis al li, ke li morgaŭ portu salon al ni. Ĉu vi aŭdis tion? Vi vidos! Li venos! Luphomo devas obei tian ordonon en sia homa formo. Vi vidos, ke li estas la unua filo de virino, kiu naskis sep filojn, kaj ke li ne iĝis baptopatro de sia plej juna frato, aŭ ke li estas la sepa filo de pastro, aŭ ke li estas iu kiu iam deziris mortpafi luphomon.'

"Frostotremo min atakis kaj mi ne povis dormi dum longa tempo.

"Sed la sekvantan tagon mi preskaŭ ne plu pensis pri la nokta travivaĵo. Tamen Benedito ne volis daŭrigi nian marŝon. 'Ne,' li diris, 'ni iru nun en la kabanon por la ĉasistoj sur la altaĵo.'

"Certe jam delonge neniu estis tie. La tegmento jam estis truhava. Ni ekbruligis fajron kaj dum Benedito

fritis la ĉasitan dazipon, mi iris tranĉi kelkajn palmitojn.* Kiam mi revenis kun la palmitoj mi preskaŭ lasis ilin fali. Venis de malsupre mezjuna granda viro. Ĉu . . . ? Ne, mi pensis, certe estas alia ĉasisto. Tamen mi eniris la kabanon kun batanta koro. Ankaŭ la fremdulo eniris.

“‘Bonan tagon’ li diris afable. ‘Bonan tagon al vi’ respondis Benedito kaj rigardis min. ‘Ĉu ankaŭ vi ĉasas? Venu, manĝu kun ni.’

“‘Ne,’ respondis la viro, ‘mi ne ĉasas, sed mi akceptas vian inviton. Ĉi tie mi havas salon por via fritajo!’

“Mi ĝuste tiam senŝeligis la palmitojn. Kiam li diris tion mi el teruro entranĉis mian fingron. Vidu, ĉi tie mi ankoraŭ havas la cikatron!’ kaj li montris al ni blankan strion sur la maldekstra fingro. “Tiam mi forte tremis. Sed Benedito trankvile salis la manĝaĵon per la ricevita salo kaj daŭrigis la babiladon. Li ja sciis, ke luphomo en sia homa formo ne estas danĝera kaj ke li eĉ en sia lupa formo poste ne kaŭzas malbonon al iu kiu manĝis sian salon. Jen la homo rakontis al ni kie li loĝas, kio estas lia nomo kaj ankaŭ demandis nin pri tiaj informoj. Li estis tre afabla, tute normala viro. Li manĝis kun ni. Poste Benedito enpakis pecon de la fritajo per bananfolio kaj donis ĝin al la viro.

“‘Tio estas por viaj fratoj. Vi havas multajn, ĉu ne?’

“‘Jes, ni estas sep fratoj sed mi havas nenian fratinon.’

“‘Tiom! Do donu ĉi tiun pecon speciale al via baptofilo. Estas mia danko pro la salo.’

“‘Baptofilon mi ne havas!’

“Mia koro ekbatis. Li prenis la paketon kun danko kaj diris: ‘Mi almenaŭ ne venis vane ĉi tiun longan

vojon. Mi tute ne scias, kial mi subite pensis: Tie supre estas iu kiu certe bezonas salon. Mi mem miris pri tio. Sed mi deziris tiom forte alporti al vi tiun salon, ke mi iris kvankam mi devus rikolti rizon hodiaŭ. Nu, ĝis revido! Nepre vizitu min se vi denove venos en mian regionon!’ kaj li iris for.

Miaj haroj jam hirtiĝis de teruro. ‘He’ demandis Benedito, ‘ĉu nun vi kredas ke ekzistas luphomoj? Aŭ ĉu vi pafos alian fojon . . . ?’”

Ni ĉiuj silentis. La maljuna edzino de Johano premis sin tremante en la angulon kaj rigardis timeme tra la truon en la muro en la lunohelan nokton. Estis ankaŭ hodiaŭ vendredo. Ĉu eble tia luphomo jam ĉirkaŭiras ŝian kabanon kaj tuj envenos por ŝin manĝi? Sed vere ŝi ne plu estis infano. Tamen, kiu scias, eble ĝi manĝas ankaŭ plenkreskulojn ne trovinte infanon . . .

Johano fumis kaj alrigardis sian cikatron. Lia vizaĝo estis serena. Subite rideto trapasis lian sulkohavan vizaĝon.

“Jes,” li komencis denove. “Ekzistas luphomoj, sed ne ĉiu, kiu tiel sin nomas fakte estas tio. Mi estis en la vendejo, kiun posedas nun Manuelo. Estis tiam vendredo. Ni estis tie tuta aro da junuloj. Ni babilis, trinkis kaj kartludis. Jam vesperiĝis, kiam envenis du viroj. Ili aĉetis rizon, fazeolojn kaj maizofarunon kaj multajn aliajn aferojn. Unu metis ĉion en sakon. La vendisto adiciis ĉion. Sumiĝis je pli ol cent milrejsoj. Tio estis tiam grandega sumo. Ni ĉiuj rigardis lin mirigite ĉar li tute ne havis la aspekton de riĉulo. ‘Jes,’ li diris trankvile elprenante sufiĉe dikan monujon kaj metante tri milrejsojn

* palmitoj estas manĝebla parto de iu palmo.

Belartaj Konkursoj 1953 : Poezio Originala

La Soleca Dio ricevis la 2an premion ; **Renkontiĝo** kaj **La Granda Aventuro** la trian.

Renkontiĝo

Vaste vasta lag'. Sen konsola vorto
remas la barkist' al alia bordo.
Diru al mi ja, ke li mem vin sendas,
ke li atendas !

Daŭras la ignor', dume ond' post ondo
apartigas nin de la brua mondo.
Unu vorton nur : Ĉu ni renkontiĝos ?
Jesu ! Sufiĉos !

Mi komprenas jam, kien trans ondaron
veturigas min silentema Ĥaron.
Jen herbeja bord', la mortint-azilo.
Stagnas remilo.

Kaj mi vidas nun ĉe la cel' de l' celoj :
Ombro levas sin inter asfodeloj
per konata mov', kun malpacienco ...
Fino ... Komenco ... ?

Eli Urbanová.

La Granda Aventuro

Dormo ! ni nomas ĝin per tiu nomo ;
plej granda aventuro de l' homid'.
la ĉiunokta pruvo, ke ĉe l'homo
en vivo kaj en morto regas fid'.

Kiel trankvilas korpo de l' dormanto
en tiuj horoj kiam, for de l' mond',
libera de la spac- kaj tempo-vanto
spirit' spiritas en ne-fremda rond'.

Ne vidas la okulo, lango mutas,
orelo surdas al la mondo-zum' ;
sed kiaj novaj fortoj jam debutas
triumfe vivoplenaj en mallum' ?

Ne morto ! Tamen estas ĝi ne vivo,
sed nova plilarĝigo kaj liber'
de la animo—la paliativo
dumnokta el trans karnobarier'.

John S. Dinwoodie.

La Soleca Dio

Noktmezo kaj mallumo—unu stelo
briletis sur velura fon',
tutsola en la vasto de l' ĉielo ;
veadis venta monoton'.

Rigardon ĵetis mi al nokto nigra ;
mallaŭte en la malproksim'
aŭdiĝis krio de ansero migra ;
animon mian skuis tim'.

Teruris tamen min nek la insido
de l' nokto, nek la birdo-kri',
sed, kvazaŭ en abismon, la ekvido
en koron de soleca di'.

Solecon lian la natur' spegulas
en si fidele ; ĉiu sent'
de l' granda universo-kor' modulas
la tonojn de l' multvoĉa vent'.

Sur la sennombraj montoj de l'eterno
majestas li en sol-seren',
la ĉion-direktanta vivokerno,
ekster la homa komprenem'.

Profundas tiom la soleco dia,
ke l'homo ne solecas pli
en morto-horo, ol en vivo sia
solecas en eterno di'.

John S. Dinwoodie.

Esperanto en la praktiko

Kun ĉi tiu numero ni dissendas tre belan
faldfolion *Florbulboj, ankaŭ en via ĝardeno*,
eldonita de The Associated Bulb Growers of
Holland, Wilhelminastraat 13, Haarlem
Nederlando.

Se vi skribus al tiu asocio por gratuli ĝin
pro tiu uzo de Esperanto, samtempe indiku,
ke rezulte vi aĉetis bulbojn ĉe loka butikoj
(kompreneble vi tion faros).

Belarta Konkurso 1953 : Prozo originala

R. J. French

Unua Premio

Senhejmulo

Neniu scias ion pri la deveno de Senhejmulo. Unu matenon ĝi aperis sur la ĉefstrato de la vilaĝo Hakŝam, miaŭadis kaj kun vertikala vosto provis froti sin al la kruroj de preterpasantoj. Tiuj, eĉ la kompatemaj, malatentis. Ili devis rapidi al sia taga laboro aŭ timis, ke ili forlogos ĝin de ĝia hejmo.

Posttagmeze ĝi trovis sin en la plej altklasa parto de Hakŝam, kaj vagis sur la trotuaro laŭ alta brika muro, kiu enfermas la belan ĝardenon de Gesinjoroj Kromplot. Ĝi atingis ekstremon de la muro kaj pasis inter du feraj stangoj de kradbarilo. Ŝajne, katidoj instinkte provas influi homojn kaj ĉiel klopodas akiri daŭran hejmon. Senhejmulo supreniris grandajn ŝtupojn, sidigis sin sur la pordosoĵlon kaj miaŭis. Sed la servistinoj laboris, aŭ ripozis, malproksime en la domo. Do Senhejmulo restis tie ĝis du knabinoj portantaj tenisrakedojn alvenis. Manĝo sonorigis dum Alico karesis la katidon. Kiam la pordo malfermiĝis Senhejmulo tuj eniris la vestiblon. “Huŝ! Huŝ!” diris la servistino, svingante la brakojn. Alico riproĉis ŝin, “Kiel vi povas esti tiel senkompata?”, kaj iris por peti lakton de la kuiristino. Tiu donis tre domaĝe, murmurante: “Sed kion diros via patrino, kiam ŝi revenos, Fraŭlino Alico?” “Ŝi ne povas ne ami ĝin — ĝi estas tiel beleta”, respondis la knabino. La laca katido tre malsatis. Ĝi trinkis la lakton kaj ekdormis. Vekiĝinte, ĝi kondukis laŭ la kutimaj moroj de sia speco; interesiĝis pri la propra vosto, kaj

ruliĝis sur la planko, petole frapante neekzistajn objektojn.

“Adopti katon? Certe ne!” ekkriis Sinjorino Kromplot. “Katoj portas finsektojn kaj malsanojn de loko al loko. Ĝi foriru tuj. Huŝ!” Kun la helpo de servistino ŝi forpelis la beston.

Post du horoj ĝi reaperis ekster la kuirejo. Sinjorino Kromplot ordonis: “Ne enlasu la bestaĉon. Morgaŭ, se ĝi ankoraŭ restos, Grimps forigu ĝin”.

Sinjoro Grimps, ĝardenisto kaj diverstaska viro, laŭtempe alvenis. Vespere, farinte sian laboron, li iris hejmen, kunportante la katidon en korbo. Li ne volis dronigi katidon, estante tro bonkora. Li ne povis memori iun el siaj konatoj, kiu akceptus ĝin. Sinjorino Grimps certe ne bonvenigus ĝin.

Ĉe la rando de Hakŝam li preterpasis parcelon da grundo nomitan “la kampo de Hunt”, kie multaj personoj jam ŝutadis rubon. La historio silentas pri Hunt. Eble li estas mito. Venis en la kapon al Grimps, ke li povas lasi la katidon tie. La loko estis mizera, tamen la besteto trovos iom da ŝirmo inter la rubo. Sur la teron, apud rusta fornĉo, li metis restaĵon de sia lunĉo. Dum Senhejmulo flaris la manĝaĵon Grimps rapide forkuris.

Sekvantajn semajnojn la elpelito diligente serĉis hejmon, tamen ĉiam sensukcese. En multaj domoj estis jam kato aŭ eĉ fera hundo. Fine la hejmtrovanta instinkto velkis. La katido fariĝis maldika forta duonsovaĝa kato. Somere ĝi vivis

sufiĉe bone, kaptante ratojn kaj musojn, kaj dormante en la sunlumo. Iufoje homoj lasis malfermitaj fenestrojn de manĝaĵejoj, kie troviĝis ŝtelindaj frandaĵoj. Vintre la lukto por ekzistado tre severiĝis. Taŭgaj dormlokoj kaj ia manĝaĵo maloftis. Senhejmulo estis bonŝanca se, post diligenta serĉo en multaj kortoj, ĝi trovis fiŝkapon aŭ ion tian. Kvankam ĝi neniam havis hejmon, tamen de tempo al tempo ĝi revenis al sia ĉefkvartalo, la kampo de Hunt, kaj tien ĝi iris por morti, post kvin jaroj, sentante sin malsana. Oni povas esperi, ke ĝi ne suferis doloregon. La fakto, ke bestoj kutime forpasas silente, kredigas, ke eble por ili la fino ne estas terura. Ĝi atingis la eternan pacon. Ĝi jam ne povas malsati; hundoj persekutos ĝin neniam plu. Ripozante en la ĉiama dormo, ĝi kvazaŭ senkonscie defias la tutan universon.

* * *

Haroldo Vaskel, portante siajn ilojn, serĉis pentrindan pejzaĝon. Li ekvidis mizeran scenon. Staris vico da domaĉoj sen interspacoj. Stuko jam falis multloke de malpuraj muroj. Grizaj ĉifonoj pendis ĉe fenestroj; jen kaj jen papero anstataŭis vitron. Nur partoj restis el kadukaj lignaj kortbariloj. Inter tiu fono kaj Haroldo kuŝis la kampo de Hunt, kun montetoj da malnova mortero, pecoj da fero, biciklo-skeletoj, ŝrumpintaj botoj kaj tiel plu. La koro de la artisto batis pli rapide.

Ekzistas diversaj difinoj de la termino *realismo*. Laŭ Haroldo ĝi signifas, pentradon de objektoj kiel ili aspektas, sen ia provo plibonigi ilin; oni devas ankaŭ elekti malagrablajn aferojn, prezentante ilin sur la bildo, kiel eble pli mizeraj ol ili vere estas.

“Jen ideala subjekto”, pensis la artisto. Li rimarkis, ke la naturo jam iom malbonigis la aferon. Rubusoj, kardoj kaj epiloboj kaŝis kelkajn krudaĵojn. Nu, tiuj stultaj kreskaĵoj ne aperos sur lia bildo. Li eklaboris kaj tiel absorbiĝis, ke li eksaltetis kiam voĉo diris: “Kion vi faras?” Li vidis malgrandan knabon.

“Mi pentras bildon”.

“Kial?”

“Nu, la okupo plaĉas al mi, kaj eble mi gajnos monon”.

“Ĉu vi ne povas labori, kiel viro?”

Haroldo rapidis ŝanĝi la rolojn, mem fariĝante la demandanto.

“Kial vi ne estas en lernejo?”

“Oni ne permesas, ĉar mia fratino malsanas”.

“Kio estas al ŝi?”

“Ŝi havas morbilon”.

“Mi tre bedaŭras”, diris Haroldo, daŭrigante sian antaŭskizon. La knabo restis proksime. Post kelkaj minutoj, sen celo krom rompi la silenton, Haroldo demandis: “Kio estas la griza objekto en tiu surflanka cisterno? Ĉu vi povas vidi?” La knabo kuris antaŭen, enrigardis kaj vokis: “Mortinta kato”.

Mirinda inspiro venis al Haroldo. Ĉiu artisto scias, ke pentraĵo bezonas “centron de intereso”.

“Kia grandioza ideo”, li pensis. “La mortinta kato estu la elstara objekto, kun la rubamaso malantaŭ ĝi, kaj pli malproksime la domaĉaro”. Li leviĝis kaj ekzamenis la beston. Jes, ĝi ja taŭgos. Tamen li timis tuŝi ĝin, liaj elegantaj manoj neniam kontaktis similan objekton. Tial li proponis al Joĉjo Fips, ke tiu metu la katon sur la elektitan lokon. Joĉjo tre volonte konsentis, ricevante du pencojn rekompence.

Posttagmeze, fordiboĉinte siajn du pencojn, la knabo revenis, esperante enspezi ion denove. La artisto ne estis tie. Senhejmulo restis ĝuste kiel ĝi kuŝis matene. Joĉjo sentis sin forte allogata de la kato. Evidente ĝi estas tre grava afero; la fremda sinjoro multe ŝatis ĝin. La sekvonta konduto de Joĉjo estis kurioza. Eble spertulo pri la psikologio de infanoj povus doni kontentigan klarigon. Oni ne forgesu, ke la knabo havis nur sep jarojn. Li ligis al Senhejmulo pecon de ŝnuro, kaj trenadis la mortinton de la grundo sur la trotuaron, kaj en la vilaĝon. Kelkaj homoj rigardis lin indigne, tamen li persistis.

“Estas abomeninde”, ekkriis Fraŭlino Drapo. Ŝi ĵetfermis la pordon de sia merceraĵbutiko kaj sur la servtablon kaj sin mem ŝprucigis odekolonjon. Sinjoro Bromat, la buĉisto, elkuris kolere. Ĝustatempe li bridis sian inklinon bati aŭ riproĉi la knabon. Li estis tre rapida pensanto. Kiel fulmo trairis lian menson: “Se mi dirus ion al li, eble li forkurus lasante la katon ĉi tie, ekster mia butiko. Mi mem devus forporti ĝin. Ne decas, ke oni vidu buĉiston kiu portas mortintan katon en sian butikon. Mi ja konas miajn suspektemajn klientojn”. Tial li silentis, kaj Joĉjo kaj Senhejmulo daŭrigis sian triumfan marŝon tra la vilaĝo ĝis la alta brika muro de Gesinjoroj Kromplot, kie Senhejmulo sola vagis antaŭ kvin jaroj. Laca marŝanto povas elteni dum li preterpasas interesajn objektojn, sed kiam li havas flanke de si unutonan muron li tediĝas. Subite Joĉjo konsciis, ke ĉio en la mondo estas vana; nenio valoras zorgon; trenado de mortinta kato estas sensenca. Li faligis la ŝnuron kaj iradis. Post

kelke da paŝoj li turniĝis kaj vidis Senhejmulon kuŝantan malgaje sur la trotuaro. Li memoris la konsilon de sia instruistino: “Estu ordema; ne disĵetu rubon; helpu konservi stratojn kaj parkojn netaj”. Ne, li ne povas lasi Senhejmulon tie. Kion fari? Li rigardis la malbelan muron. Por kio ĝi utilas? Por kaŝi la katon! Jes, jen la solvo; Senhejmulo devos iri trans la muron. Tamen sepjara knabo ne povas jeti katon trans altan muron. Nesimpatia maljunulo venante laŭ la strato rigardis Joĉjon malame, sed daŭrigis sian vojon senvorte. La knabo malesperis kaj ĵus decidis ke li devas forlasi la aferon, kiam li vidis fortan, pliaĝan knabon venantan el la malproksimo. Li atendis, intencante klarigi. Davido Timson ne bezonis klarigon. Tuj li komprenis la situacion. “Tio estas facila”, li diris. Li malligis la ŝnuron, per la vosto rotaciigis Senhejmulon ĝis ĝi akiris la postulatan rapidon, kaj subite maltenis. Senhejmulo malaperis laŭ geometria kurbo.

La knaboj jam faris sian ĉiutagan bonagon kaj iris hejmen plenaj de sinaprobo.

* * *

Alico Kromplot, kiu kompatas la katidon antaŭ kvin jaroj, estis nun belulino kaj fianĉino de Alberto Montago. Li estus bonulo se liaj riĉaj gepatroj ne estus dorlotintaj lin. Pro tro facila vivo li jam perdis intereson pri ĉio. Kompreneble Alico interesis lin; ŝi estis la sola escepto. Precize kiel Joĉjo li sentis, ke nenio en la mondo valoras; tamen la pesimismo de Joĉjo daŭris nur minutojn; Alberto restis same ĉiam.

Gesinjoroj Montago faris sian unuan viziton al la familio de Alico. Sinjorino Kromplot tre fieris pri sia

ĝardeno kaj deziris imponi al la riĉaj vizitantoj. Ŝi ordonis, ke temanĝo estu servota en la ĝardeno, kaj oni aranĝis faldseĝojn kaj malaltan tablon apud la alta muro. Estus pli agrable en la centro apud la lageto, sed tie oni estus sub la observo de homoj trans la muro, kiuj rigardus el la dua-etaĝaj fenestroj de domoj sur la kontraŭa flanko de la strato. Tio estus netolerebla.

Rododendroj kaj rozarbetoj provizis multkoloran kadron ĉirkaŭ granda razeno. Lageto kun nimfeoj kaj orfiŝoj kuŝis centre. Platanoj, betuloj kaj pomarboj kaŝis ĉiujn najbarajn domojn krom la transmuraĵoj. Alberto klinis sin malantaŭen en sia seĝo iom ekster la malgranda rondo, kontribuante malmulton al la konversacio. Efektive li diris nenion krom, de tempo al tempo, "tute", aŭ "nepre". La aliaj babiladis amike, trinkis teon kaj manĝis frandaĵojn. Sur la tablo antaŭ Sinjorino Kromplot staris granda pelvo plena de konfititaj framboj naĝantaj en la propra suko. Sinjorino Montago diris, "Mi ja envias al vi vian trankvilan vivon en ĉi tiu rava vilaĝo".

"Jes", respondis Sinjorino Kromplot, ekkulerante frambojn el la pelvo en telerojn. "Nenio iam okazas ĉi tie. Iufoje mi opinias, ke estas *tro* trankvile. Oni bezonas"

Krakegas! Ŝprucegas! Ŝajne la pelvo eksplodas!

Dum tri tutaj sekundoj neniu, krom Alberto, konstatis tion, kio okazas. Kun granda interna ĝojo li rigardis la miksaĵon de konsterno kaj framboŝuko sur la vizaĝoj de siaj geamikoj, kaj ekkonvinkiĝis, ke la vivo ja valoras, interese kaj aferoj certe okazas! Sinjoro Kromplot reakiris la prudenton kaj proponis teorion: "Tio estas mortinta kato". Ĉiu konsentis.

Se Sinjorino Kromplot estus akceptinta katidon, sendube post respektinda vivo kiel dorlotata besto de la familio, ĝi fine ripozus sub la pomarboj en la ĝardeno. Efektive, ĝuste tie Sinjoro Grimps enterigis ĝin la tagon post la vizito de Gesinjoroj Montago. Malgraŭ la forpelo, la fino estis tute same. Jen la sorto.

La luphomoj (*daŭrigo de paĝo 298*)

sur la tablon. 'Tuj. Sed unue donu por ĉi tio brandon al ĉiuj.' Ni kompreneble tre ĝojis pri tio ĉar por tri milrejsoj oni povas ricevi multe da brando. La vendisto disdonis la plenigitajn glasojn kaj ni ĉiuj trinkis. Jam noktiĝis. Subite la viro diris al la pli juna viro: 'Jam flugas la kuriango.'

La alia faligis sian glason, malfermegis siajn okulojn kaj komencis demeti sian ĉemizon kriante per terura voĉo:

"'Venis mia horo! Mi devas transformi min! Mi devas plenumi mian sorĉodestiron!'

"Ĉiuj ekstaris kaj eĉ forgesis trinki sekve de teruro. Fine la vendisto trovis sian voĉon. La viro, kiu havis dense harumitan bruston, jam komencis demeti la pantalonon! Sed la vendisto kriis:

"'Pro dio! Ne transformiĝu ĉi tie! Eliru!'

"'Tro malfrue!' kriis la alia per terura voĉo, sed li tamen forkuris nur en pantalonon.

"Kiam forpasis nia teruro, ni konstatis, ke ankaŭ lia kunulo foriris nerimarkite . . . kun la sako!"

Belartaj Konkursoj 1953: Teatraĵo Originala

Unua Premio

La Sinjorino, kiu Kredis

de G. C. Jervis

Personaro : S-ro Golortsa
S-ino Golortsa
Timoteo Tizivker

Ni vidas Ges. Golortsa, mezaĝajn geedzojn. Ili matenmanĝas. La matena ĵurnalo legata de S-ro G. formas barilon inter ili ne nur fizikan. S-ino G. jam finis, sed S-ro G. ankoraŭ manĝas.

S-ino GOL. : Ĉu estas io interesa en la ĵurnalo, Georgo ?

S-ro GOL. : Jes . . . ne . . . Kion vi diris ?

S-ino GOL. : Ĉu estas io interesa en la ĵurnalo ?

S-ro GOL. : Ha . . . ne . . . dudek homoj mortis en dombrulo . . . io tia . . . nenio grava.

S-ino GOL. : Kion diras la horoskopo ?

S-ro GOL. : La—kio ?

S-ino GOL. : La horoskopo. Pri la planedoj ; kiel ili influas la vivon, laŭ la tago de naskiĝo.

S-ro GOL. : Stultaĵo ! (Li ne ĉesis legi).

S-ino GOL. : Ho, sed tute ne. S-ino Nisana legis antaŭ nur semajno en sia horoskopo, ke ŝi ricevos monon ; kaj en la morgaŭa tago ŝi ricevis de notario leteron pri la testamento de sia kuzo.

S-ro GOL. : Simpla stultaĵo. Ĉu vi ne komprenas, Roza, ke la uloj, kiuj miksas tian kaĉon da infanaĵo, nur skribadas tion, kio venas al ili en la menson ? Nenion ĝi rilatas al planedoj, nek al io tia.

S-ino GOL. : Ho, sed certe vi eraras, Georgo. Kiam mi estis juna knabino, mi havis verkon pri la temo. Ĝi estis tre malsimpla, kaj mi nenion komprenis el ĝi ; sed oni devis desegni skemon kaj meti planedojn diversloke sur ĝi . . .

S-ro GOL. : Roza, mi petas, mi petegas : lasu min legi. Legu vian elektroskupon, aŭ kion vi volos, post mia foriro.

S-ino GOL. : Nu, se tiel vi sentas vin. (ŝargita paŭzo). Sed ĉu vi ne povus transdoni la folion kun la horoskopo ?

S-ro GOL. : (eksplodas) Pro Dio, Roza—(subite rigardas sian brak-horloĝon). Ho, la infero ! Nur rigardu la horon ! Mi maltrafos la trajnon. Tia klaĉado pri horoskopo kaj tiel plu ! Rapide ! Mian palton ! Mian ĉapel—glu, glu !

(La kafo, kiun li penas fingluti, estas ja tro varma. S-ino GOL. kuras tien kaj ĉi tien kaj helpas lin surmeti palton kaj ĉapelon. Li sukcesas fingluti la kafon kaj forkuras. S-ino GOL. viŝas la frunton. S-ro GOL. uragane reaperas).

Mian tekon !

(Li ekprenas la tekon kaj denove forkuras).

S-ino GOL. : He, la viroj !

(Ŝi komencas formeti la manĝilojn.

Vidinte la ĵurnalon sur la planko, ŝi tamen ĝin prenas kaj eklegas).

Hm! Denove ŝi edziniĝos! Se mi nur estus filmaktoro! . . . paĝo kvara—jen ĝi. La centaŭro—la leono—“Por homoj naskitaj en ĉi tiu periodo, hodiaŭ estas tago tre konvena per persona donacemo. Ne lasu iun foriri nekontenta for de via sojlo. Vi tion ne bedaŭros”. Por persona donacemo . . . ne lasu iun foriri nekontenta . . . vi tion ne bedaŭros . . .

(La elektra pordotintilo signalas. S-ino GOL. ĵetas la manojn kaj foriras. Oni aŭdas la sekvantan konversacion el ekstere).

TIMOTEO TIZIVKER: Bonan matenon, kara sinjorino. Hodiaŭ estas por vi feliĉa tago. Jen mi havas varojn bonajn kaj malkarajn—galantan galanterion. Nur ekzameni miajn ŝulaĉojn, kolumbutonojn, pinglojn, ŝelkojn—

S-ino GOL.: Ne, mi dankas. Neniam mi aĉetas ĉe la pordo.

TIMOTEO: Mi tamen vin petegas: faru escepton! Nur rigardu. Ĉu vi iam vidis tiajn—

S-ino GOL.: Mi diris, ja “ne”. Foriru. Forprenu vian piedon; mi volas fermi la pordon. Rapide; alie mi venigos policanon.

TIMOTEO: Sinjorino, kia vorto! Mi foriras.

(Oni aŭdas la fermon de la pordo, S-ro GOL. revenas kaj komencas ordigi la manĝilojn).

S-ino GOL.: Hontinde! Vere hontinde! Jen mi, sola en la domo, kaj tiaj homoj min plagas! Ili meritas ĉelon. Nu, tiu specimeno foriris nekontenta. Foriris nekontenta? . . . foriris nekontenta! *(Ŝi denove prenas la ĵurnalon kaj*

legas) “Ne lasu iun foriri nekontenta . . . ” Kion fari? Kion fari? *(Post kelksekunda nedecido, ŝi foriras kaj evidente malfermas la dompordon. El ekstere)* A . . . He! Revenu! Revenu! Ne, ne vi. Li, tie. Jes, vi, sinjoro. Bonvolu reveni.

Voĉo de TIMOTEO: Vi min vokis, sinjorino?

Voĉo de S-ino GOL.: Jes. Jes. Mi—eble mi tamen aĉetos ion.

Voĉo de TIMOTEO: Ha, jes—ŝanĝi la decidon, tio estas ĉiam la privilegio de la sinjorinoj! Volu nur ekzameni—

S-ino GOL.: Brrr! Kia vento! Estas tre malvarme ekstere. Bonvolu enveni. Tamen viŝu la piedojn.

(TIMOTEO sekvas S-inon GOL. en la ĉambron. Li estas portreto de nesukcesa aktoro. En la mano li havas valizeton, kiu entenas liajn varojn).

S-ino GOL.: Sidiĝu, mi petas. Certe, peniga estas via laboro, ĉu ne, vendi de pordo al pordo?

TIMOTEO: Vi diras vere, kara sinjorino. Estas al mi tre preme. Ne ĉiam mi estis tia.

S-ino GOL.: Ĉu vere ne?

TIMOTEO: Tute ne. Mi konis ja siatempe la aplaŭdon de la publiko ŝanĝiĝema. Mi staradis ja sur la scenejo kaj tiris larmojn. Ĉar sciu, sinjorino, ke mi estas laŭ profesio—laŭ profesio vera—aktoro.

S-ino GOL.: Aktoro? Kiel interese!

TIMOTEO: Jes, ja. Kiaj tagoj! Mi vivis en silko kaj veluro, en ĝojo kaj plezuro. Mi bone sidis, kaj la sorto ridis. Sed—ve, ve—

S-ino GOL.: Io misokazis?

TIMOTEO : La kaŭzo de mia falo estis la monstro, Drinko.

S-ino GOL. : Ha, bedaŭrinde.

TIMOTEO : Sen tio, mi estis tuj pentranta en la ĉefurbon—en la metropolon mem. Sed, ve—la vino! la virino! (*rapide*) Sed ĉefe la vino. Mi glitis ĉiam malsupren. Ĉiam miaj roloj fariĝis pli kaj pli malgravaj. Finfine—mi hontas ripeti la aferon, sed la malsato pelis min al tio; la malsato de kaj la soifo — finfine mi devis akcepti dungon en varietea prezento. Vi certe vidis tian prezenton, sinjorino. Ĝi estas ja triviala afero; du viroj vestas sin per la imita felo de ĉevalo. Eĉ tie mi havis la pli humilan rolon; mi partoprenis, kiel la malantaŭa krurparo.

S-ino GOL. : (*mire*) : Nu, efektive!

TIMOTEO : Tiel mi almenaŭ enspezis. Sed ĉiam la diabla drinko min persekutis. Unu tagon, venis—aj!—la datreveno de mia naskiĝo. Mi festis kun amikoj. Unu gluteto—du—tri—kvar—mi komencas havi iom da vaporo en la kapo. Fine oni vokas min. Estas jam preskaŭ la tempo por mia prezento. Mi aliras la scenejon. Tie sinjorino kantas, tiel bele, tiel kortuŝe. Mi volas larmi. Mi volas premi ŝin al mia brusto kaj kunkanti. Kaj efektive mi tion faras; eĉ en mia kostumo. Granda bruoj—oni multe vortŝutis sur min. Mi ricevis tujan maldungon. De tiam mi trenas mian vivon de mizero al mizero.

S-ino GOL. : Kia stranga historio!

TIMOTEO : Ne pli stranga, ol vera, sinjorino. Ve; por mi, ne gutas mielo el la ĉielo. Lastatempe, kiel vi vidas, mi perlaboras mizeran gajneton, vendante al nerespond-

ema publiko miajn bonajn varojn. Ekzemple, jen tre taŭgaj kolumbutonoj. Ĉu la sinjoro dommastro ne volus—?

S-ino GOL. : Ha, ĉiam la viroj perdadas tiujn, ĉu ne? Mi aĉetos ses.

TIMOTEO : Ha—ĉu antaŭajn aŭ malantaŭajn, kara sinjorino?

S-ino GOL. : Vere, ili malsimilas, ĉu ne? Po ses de ambaŭ.

TIMOTEO : Jen bobenoj da fadeno, tre fortika; blanka, nigra, blua—

S-ino GOL. : Po unu de ĉiu koloro. Ne, po du.

TIMOTEO : Jen kudriloj, bonaj angle-faritaj kudriloj.

S-ino GOL. : Du—tri—ses paketojn.

TIMOTEO : Pinglojn?

S-ino GOL. : Ses foliojn.

TIMOTEO : Ŝulaĉojn?

S-ino GOL. : Mia edzo havas kvar parojn da ŝuoj, do kvar parojn da laĉoj, mi petas. Ne—ili povus rompiĝi; do ok.

TIMOTEO : Ŝelkon?

S-ino GOL. : Jes.

TIMOTEO : Kravaton? Helan kaj belan.

S-ino GOL. : Certe, jes. (*Ĝi estas ja pli hela ol bela*). Kaj vi ankoraŭ havas, ĉu ne? Ĉu mi ne vidas iajn butonojn sur karto?

TIMOTEO : Jes, kara sinjorino; ili estas specialaj, rapidfiksaj, butonoj por la pantalono. Oni pikas jenan pecon tra la veston kaj premas la butonon sur la pinton. Tiamaniere—tak! Ĝi fiksiĝas sen kudro. Sed, sinjorino, mi hontas proponi tiajn al vi. Vi estas videble tiel talenta; sendube vi kudras per fluganta kudrilo.

S-ino GOL. : (*ridas*) Ne, certe mi ne bezonas tiajn. Nu, sinjoro, kiom—?

TIMOTEO : Ha, jes! Unu, dek, dek kvin—hm, ha—dudek kvin kronoj.

S-ino GOL. : (*iom konsternite*) Dudek—! (*regas sin*) Bone. Nu, kie—Bonvolu atendi, sinjoro, mi devas trovi mian monujon.

(*Ŝi foriras. Oni konstatas el la direktado de la rigardo de TIMOTEO, ke tiu aŭdas ŝin supreniri ĝis supra etaĝo. Li ĉirkaŭrigardas en la ĉambro. Du bulkoj estas sur la manĝotablo. Li enpoŝigas ilin. Ekvidinte arĝentan cigaredujon sur tableto, li kvazaŭ hazarde kaj senkulpe aliras; poste li, per unu movo, malfermas sian valizeton, enmetas la cigaredujon, fermas la valizeton. Same li faras ĉe du arĝentaj kandelingoj sur la kamenbreto. Li saltas al sia antaŭa pozicio kaj reprenas senkulpan mienon. S-ino GOLORTSA revenas*).

S-ino GOL. : Mi iom pripensis. Tiuj rapidfiksaj butonoj—se mia edzo iradus kun karto da ili en la poŝo, kaj butono hazarde forrompiĝus, li povus tuj fari riparon, ĉu ne? Mi do aĉetos karton. (*TIMOTEO hezitas*) Nu, nu, malfermu vian valizon kaj donu.

TIMOTEO : La pantalono de via edzo; ĉu la butonoj estas ekster la vesto, aŭ interne de ĝi?

S-ino GOL. : Kia stranga demando! Mi kredas, ke ekster; jes, certe, ekster.

TIMOTEO : Nu, sinjorino, bedaŭrinde la butonoj, kiujn mi vendas, taŭgas nur por fiksi interne de la vesto.

S-ino GOL. : (*mistifikite*) Nu, supozeble vi scias la plej bone. Jen do via mono: dek, dudek,

dudek kvin. Kaj — kaj bonan ŝancon!

TIMOTEO : Multan dankon, kara sinjorino. Tia afableco! tia bonkoreco! KREDU, min, sinjorino, neniam mi vin forgesos.

S-ino GOL. : Ankaŭ mi ne forgesos vin tre rapide, sinjoro.

TIMOTEO : Eble ne, sinjorino, eble ne. Adiaŭ, adiaŭ . . .

(*Li “adiaŭas” sin eksteren, akompanate de S-ino GOL. Post unu momento ŝi revenas kun kontenta mieno*).

S-ino GOL. : “Vi tion ne bedaŭros . . .” Hm.

(*Ŝi komencas klopodi en la ĉambro. La ĉefpordo aŭdeble malfermiĝas kaj refermiĝas. Venas S-ro GOL. Ŝi gapas lin iom komike*).

S-ro GOL. : (*kolerete*) Nu, ja, ne necesas rigardi min, kvazaŭ mi elpuŝis kornojn.

S-ino GOL. : Sed—sed kial vi revenis?

S-ro GOL. : Maltrafis la trajnon, peston. Kaj mankas alia ĝis post horo kaj duono. Sed kiu estis tiu ulo, kiu ĵus venis el ĉi tie? Kiam li vidis min aliri la pordon, li tuj ekkuris; certe li estas jam du stratojn for.

S-ino GOL. : Mi ne povas imagi, kial li faris tion, karulo. Tio estis kolportisto, tre ĝentila homo. Mi aĉetis de li kelkajn bagatelojn.

S-ro GOL. : Kelkajn bagatelojn? Lian tutan stokon, ĉu ne? Kaj se vi kredas, ke mi portos tiun buntan kravaton, vi draste eraras. Kie estas la cigaredoj?

S-ino GOL. : En la cigaredujo, ĉu ne?

S-ro GOL. : Jes, sed kie estas la cigaredujo?

S-ino GOL. : Tie, sur la tableto . . . ho! Nu, ne mi ĝin movis. (*Ili*

iom serĉas) Ho ! Tiu kolportisto !
Li certe ĝin ŝtelis ! Li ĝin ŝtelis,
dum li estis sola en la ĉambro !

S-ro GOL. : Vi lin lasis sola en la
ĉambro ? Efektive, kiel stulte !
Kial vine donacis al li la cigaredojn
sur pleto ? Ankaŭ la kandel-
ingojn ? (*Lia voĉo formortas, kiam
li trovas, ke la kandelinoj, kies lokon
li fingre montras, efektive mankas*)
Certe, vi faris ĝuste tion, ĉu ne ?

S-ino GOL. : Ho, la fripono ! La
sentaŭgulo !

S-ro GOL. : Ne, senutile estas provi
kapti lin. Mi devos tuj telefoni al
la polico. Peston kaj plagon !
Kaj antaŭ nur semajno mi legis
bonegan verkon, kiu avertas ĝuste
kontraŭ tiaj kanajloj. Mi tiam
rekomendis ĝin ankaŭ al vi. "Kredu
min, sinjorino !" de iu Rossetti.
Ĉu vi ĝin ne legis ?

S-ino GOL. : Mi ne bone memoras.
Ĝi estis romano, ĉu ne ? . . . pri
kuracisto . . . kaj tiu senhonta
virino . . . la "provkuniklo" ?

S-ro GOL. : Ne, ne, ne ! Ne "D-ro
Dorner" ! Nu, mi iros tuj telefoni.

S-ino GOL. : Kia malfeliĉo ! Kaj
mia horoskopo konsilis, ke mi estu
donacema.

S-ro GOL. : Via horoskopo ! Ĉu vi

ne vidas jam, kien kondukas tiaj
stultaĵoj ?

S-ino GOL. : Sed ordinare ĝi estas
tiel trafa. Jen, aŭskultu. (*Eklegonte,
ŝi haltas*). Ho, la ĉielo !

S-ro GOL. : Kio estas ?

S-ino GOL. : Mi legis la malĝustan
sekcion. Mia naskiĝtago estas la
unua tago de la posta periodo.
"Homoj naskitaj inter tiuj
ĉi datoj devas gardi sin kontraŭ
trompisto—" Jen ! Nur aŭdu !

(*S-ro GOLORTSA ĵetas la brakojn—
ankaŭ la tekono, se li ankoraŭ tenas
ĝin—kaj krias de kolero. Tuj mal-
lumiĝo kaj kurteno*).


La aŭtoro libere disponigas la
verkon al ĉiu aro da samideanoj, kiu
deziros ĝin prezenti ; kompanse li
petas, ke oni raportu al li detalojn de
la prezento : loko, nomoj de rolantoj,
k.t.p., kun se eble raporto pri la
akcepto, kiun ĝi trovis ĉe la
aŭdantaro. Preferinde ne sendu
steriotipan raporton, sed mallongan
analizon, ĉu la aŭdantaro neatendite
ne komprenis tiun aŭ alian punkton ;
ĉu oni trovis interesan metodon
aranĝi la dekoraciojn, k.t.p. Adreso :
343b, Birchfield Road, REDDITCH,
Worcs., Anglujo.

LA NORMANDAJ RAKONTOJ de Guy de Maupassant

La libro estas bindita per grize-bruna tolkovrilo kun ora
surpreso. Formato : 22.5 × 15.5 cm. 210 tekstpaĝoj. Tradukis :
ROLAND DUPUIS. Ilustraĵoj laŭ la originalaj kliŝoj uzitaj en
la franca verko. La 8 apartaj tutpaĝaj bildoj (el kiuj 2 koloraj)
estas komentitaj per trafikaj notoj historiaj-geografiaj.

Prezo 23 ŝ. 6 p., aŭfranko 9 p.

Mendu ĉe UEA



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo cni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.

Mallongigoj : 1=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.


Lundo	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.45–22.15	Valencia. 43m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.40–07.45	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.30	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur unu fojon ĉiumonate). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum Nederlando.

Itala Radio. Jam de tri jaroj la stacio Roma rekomencis siajn Esperantlingvajn elsendojn kun granda sukceso. Ĝi dissendas interesan, varian programon, kiu entenas tre diversajn temojn aktualajn aŭ historiajn pri turismo, arto, literaturo, geografio, folkloro, k t.p. La daŭro de ĉiu elsendo ebligas sufiĉe kompletan priparoladon de la elektita temo.

La programo, ricevebla nur per mallongaj ondoj, estas bedaŭrinde ne tiel bone aŭdebla kiel la stacioj Bern aŭ Hilversum. En Britujo kaj Francujo oni rimarkas tre ŝanĝigemajn laŭtecon kaj klarecon, kaj kredeble rezultoj en aliaj okcidentaj landoj estas similaj. El Izraelo venas simila raporto.

La iniciatinto de tiu unuaranga programo meritas plenan helpon de la Esperantista aŭskultantaro per alfluo de leteroj al la stacio, kiu disponigas 40 minutojn ĉiusemajne al Esperanta voĉo—ne multe, sed ĝi havas la plej longan daŭron el ĉiuj stacioj.

Enigma Konkurso N-ro 81



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :

N-ro 182 : emo, temo, metio, merito, termino, minareto, marioneto, renomita, materio, ermito, metro, tero, tro.

N-ro 183 : aspekti, grenado, fripono, borakso, turkiso, faringo, danĝera, denunci, trikoto, serajlo, sinjoro, trafiko, dekolti, degradi, turisto, ŝanĝema, sekundo.

N-ro 184 : Kiu ne riskas, tiu ne gajnas. Flamiĝema kiel ligno rezina. Malbona herbo froston ne timas. Longa dormado ŝuldojn kreskigas. Plena sako ĉiun mastron al vi klinos.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 77-a konkurso : S-ro P. Brunet (Franc.) 133, S-ro E. Windeballe (Dan.) 132, S-ro D. W. A. Henskes (Ned.) 132 p.

Enigmo N-ro 187 : Iu gazeto publikigis enigmon. Ĝi donis 10 fotografaĵojn de 5 ĝemeloj, kaj la legantoj devis kunigi la ĝustajn parojn. La redaktoro tiom ĝojis pro la 123 respondoj, ke li decidis mem elserĉi, kiom da tute bonaj solvoj li ricevis, kaj kiom da solvoj estis nur parte bonaj. Li do unue faris plurajn amasetojn. En la unuan li metis la solvojn, kiuj enhavis nur unu bonan paron, en la duan li metis tiujn, kiuj enhavis du bonajn parojn, k.t.p. Nombrante la diversajn grupojn, li konstatis, ke 12 solvintoj trovis nur unu bonan paron, 34 trovis du bonajn parojn, 56 trovis tri bonajn

parojn. Sed nun okazis katastrofo. Iu frapis sur la pordon. Li ekstaris por malfermi ĝin. Estis lia edzino, sed la subita forta trablovo kaŭzis, ke pluraj solvoj de la diversaj grupoj forflugis de lia skribtablo tra la malfermita fenestro de la kvina etaĝo, antaŭ kiu li estis sidinta. Kia embaraso por li, ĉu ne? Ĉar kiel li nun povis publikigi, kiom da solvintoj trovis ĉiujn bonajn parojn kaj kial? Kiu povas helpi la malfeliĉulon?

Enigmo N-ro 188 : harm . . . ko, pa . . . uro, ne . . . scie, fi . . . o, m . . . o, si . . . nta, ve . . . nto, pia . . . di, trans . . . tigi, s . . . jo, a . . . nako, . . . io, . . . monio, s . . . cio, ab . . . a, K . . . eri, ĉ . . . o, a . . . gamo, bon . . . o, st . . . ino, f . . . tiko, k . . . iko.

Kompletigu la ĉi-suprajn vortojn per la ĉi-subaj litergrupoj. Tiuj litergrupoj en la sinsekvo de la vortoj donos proverbon el la proverbaro de D-ro Zamenhof.

ank, amn, ask, bla, bon, har, iel, iel, kie, kon, kul, lin, lma, mal, nka, nlu, one, oni, onk, pon, ron, und.

Esperanto die Weltsprache, titoliĝas bildafiŝo, 64 × 44 cm., verd- kaj nigro-kolora, montrante Eiffel-turon, Tamizo-ponton, koloseon, kupolon de moskeo, minareton, sfinkson kaj usonan ĉielskrapanton. Eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg a.d. Lahn, Germanujo, 1953. Prezo 1 ekz. Gmk, 0.60, dek ekz. 4.50,

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 253

3-an de septembro 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aŭgusto kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	6817	5587
Individuaj membroj :		
MJ	888	870
MA	3710	3815
MS	508	596
Patronoj ..	10	6
DM	263	260
HM	58	58
	5437	5605
	12254	11192

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Gmunden. D : A. Pöschko, Tagwerker-gasse 2. Tel : 529.

Saalfelden. D : F-ino E. Oberlechner, Saalfelden 219 (Salzburg). Tel : 510.

Belgujo

Halle. D kaj FD : vakas.

Quenast. D : L. De Bruyne, 42 rue de la Station.

FD (Vegetarismo) : La D.

Brazilo

Rio de Janeiro. FD (Framasonismo) : R. Xavier de Menezes, Rua Gonzaga de Campos 145, Meier.

Britujo

Nottingham. FD (Asekuro) : K. W. J. Coleman, 1 Gladys Street, New Basford. Tel : 72833.

Francujo

Colombes. D : vakas.

Germanujo

Frankfurt a/Main. D kaj FD (Framasonismo) : vakas.

Göttingen (20b). D : K. Aschbrenner, Stegemühlenweg 19.

VD : G. Beutke, Kreuzberggring 22.

Marburg (16). D : S-ino K. Schmiedeberg, Renthof 9.

Stuttgart (14a). FD (Virinaj aferoj) : S-ino M. Vogel, Pflasteraeckerstr. 45, Stuttgart 13. Tel : 432 90.

Svedujo

Göteborg. D : vakas.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Uhlen, S-ro R., Oslo, Norvegujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

594. Akerø, S-ro E. M., Bergen, Norvegujo

595. Rizzo, D-ro P., Perugia, Italujo

596. Rander, Kap. O., Johanneshov, Svedujo

597. Näslund, F-ino E., Uppsala, Svedujo

598. Dücker, S-ro A., Marbach, Germanujo

DONACOJ al Fondaĵo Montevideo: S-ino

N. Koudijs-Modoo 45 ŝil., D-ro S. Liebeck

100 ŝil., T. Elderkin 60 ŝil., F. Epstein

30 ŝil. Sumo ĝis 31 aŭg. £52 13ŝ. 0p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Internacia Konkurso 1953

Stato je la 31a de aŭgusto

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Argentino ..	500	745	149.0
2. Italujo ..	2400	2935	122.3
3. Maroko ..	600	700	116.7
4. Aŭstralio ..	900	1010	112.2
5. Sudafriko ..	300	330	110.0
6. Germanujo ..	3200	3495	109.2
7. Aŭstrujo ..	800	860	107.5
8. Francujo ..	5200	5504	105.8
9. Svislando ..	1450	1505	103.8
10. Nederlando ..	4600	4654	101.2
11. Usono ..	2300	2284	99.3
12. Danlando ..	2500	2455	98.2
13. Belgujo ..	2200	2156	98.0
14. Japanujo ..	900	870	96.6
15. Urugvajo ..	250	240	96.0
16. Britujo ..	10000	9324	93.2
17. Hispanujo ..	1500	1385	92.3
18. Finnlando ..	2200	1985	90.2
19. Svedujo ..	5500	4585	83.4
20. Kanado ..	300	250	83.3
21. Kubo ..	250	205	82.0
22. Portugalujo ..	600	470	78.3
23. Norvegujo ..	2100	1575	75.0
24. Irlando ..	250	185	74.0
25. Islando ..	450	350	70.7
26. Novzelando ..	900	630	70.0
27. Brazilo ..	6500	4220	64.9
28. Jugoslavujo ..	1500	780	52.0

KOTIZOJ 1954

Lando	MJ	MA	MS	Patr.	Jarl.	Esp.	Valuto
Argentino ..	24	65	80	650	250	48	pesoj
Aŭstralio ..	7/6	20	25	200	80	15	angl. ŝil.
Aŭstrujo ..	27	72	90	720	300	54	sch.
Belgujo ..	50	140	180	1400	600	100	fr.
Brazilo ..	45	120	150	1200	480	80	kru.
Britujo ..	7/6	20	25	200	80	15	ŝil.
Danujo ..	7.50	20	25	200	80	15	kr.
Finnlando ..	250	675	—	—	—	—	fmk.
Francujo ..	375	1000	1250	10000	4000	750	fr.
Germanujo ..	4.50	12	15	120	50	9	mk.
Hispanujo ..	35	100	120	1000	400	75	pes.
Islando ..	18	46	60	460	180	35	kr.
Italujo ..	675	1800	2300	18000	8000	1350	liroj
Japanujo ..	375	1000	1250	10000	4000	750	jenoj
Jugoslavujo	300	800	1000	8000	3200	600	din.
Kanado ..	1.25	3	4	30	12	2	dol.
Kubo ..	1.25	3	4	30	12	2	pes.
Maroko ..	375	1000	1250	10000	4000	750	fr. fr.
Nederlando ..	3.75	10	12.50	100	44	7.50	fl.
Norvegujo ..	7.50	20	25	200	80	15	kr.
Nov-Zelando	7/6	20	25	200	80	15	angl. ŝil.
Portugalujo	30	80	100	800	320	60	esk.
Sud-Afriko ..	7/6	20	25	200	80	15	angl. ŝil.
Svedujo ..	5.50	14.50	20	145	60	11	kr.
Svislando ..	4.50	12	16	120	50	9	fr.
Urugvajo ..	3	7	9	70	30	5	pes.
Usono ..	1.25	3	4	30	12	2	dol.
Venezuelo ..	4	10	13	100	40	8	bol.
Aliaj landoj	7.50	20	25	200	80	15	angl. ŝil.

Klarigoj

MJ = membro kun jarlibro.

MA = kun jarlibro kaj gazeto.

MS = Membro-subtenanto.

Pat. = Patrono.

Jarl. = prezo por tutpaĝa reklamo en la jarlibro. Duonpaĝa kaj kvaronpaĝa reklamoj kostas proporcie.

Esp. = la kosto de aparta abono (sen membreco) al *Esperanto* por tuta jaro.

**Bonvolu pagi la kotizon al la kutima pagejo kiel eble plej frue.
Tio multe helpas al ni kaj evitos interrompon en la livero de la gazeto.**

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj la azenino diris al Bileam : Ĉu mi ne estas via azenino, sur kiu vi rajdadis de longatempe ĝis la nuna tago ? ĉu mi kutimis tiel fari al vi ? Kaj li diris : Ne.

Nombroj 22. 30.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun tutmondo ; Mary Barrett, 26 Castle Street, PARKSIDE, Sud-Aŭstralio.

Senpagan provekzempleron de 20-paĝa gazeto kun multaj adresoj de korespondemuloj petu ĉe : "La Filatelisto", Cité du Moulin de Senlis, MONTGERON (S. et O.), Francujo.

Ringwood Grammar School (Fondita en 1577), West Hill Road, BOURNEMOUTH, Anglujo, bonvenigas knabojn el Britujo kaj aliaj landoj por eduko cele al **Generala Eduka Atesto** aŭ por libertempoj.

Okaze de 9a Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Perth, Januaro 1954, ni aranĝas gravan ekspozicion. Bonvolu sendi materialon, afiŝojn, librojn, broŝurojn, salutkartojn (prefere bildflanke afrankitajn), leterojn, k.t.p. Ni respondos al ĉiuj. Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo, 723 Hay Street, PERTH, Okcidenta Aŭstralio.

Mi deziras korespondi france kun franca studanto de la angla lingvo, kiu skribus angle. Celo : reciproka helpo. David W. M. Jenkins, Apartment 62, 76 Eglinton Avenue, East, TORONTO, Ontario, Kanado.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage pere de la Sekretario de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Salutleterojn kaj poŝtkartojn sendu al la letervespero okazonta en la dek-kvara Brazila Kongreso de Esperanto (7-14/1/1954) Rua Riachuelo 285, CURITIBA, Paraná, Brazilo. Ĉiu ricevos kongresmemoraĵon.

Ni deziras korespondi kun la tuta mondo : S-ro Erik Carlsson, Billingsborg 3393, SKÖVDE, Svedujo ; S-ro Henry Rydberg, Slingvägen 6, SKÖVDE, Svedujo.

Amatorajn fotografaĵojn kaj kolorajn pozitivajn (35mm. filmojn) deziras interŝanĝi kun eŭropaj gefotografistoj samideano krozanta koralan rifon. Tim Kostinek, T.S.M.V. Roylen, MACKAY, Queensland, Aŭstralio.

Senpage mi gastigos eksterlandan samidean(in)on, kiu planas viziti Finnlandon. Skribu al s-ro J. Kiviluoto, Aravatalo B 11, SUOLAHTI, Finnlando.

Internacia Kultura Semajno, 16-23 Julio 1954, en franca Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkupono S-ro G. Odent, Lycée Chanzy, CHARLEVILLE (Ardenes), Francujo. Represo petata.

F-ino Edson A. Silva, Caixa Postal 35, BARRA PIRAI, Rio de Janeiro, Brazilo, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

S-ro Pokrovsky, SANTANESIA, Rio de Janeiro, Brazilo, kolektas tekulerojn insignitajn el ĉiuj landoj kaj ilin interŝanĝos per brazilaj kuriozaĵoj de sama valoro.

F-ino Regina Cataldi, Rua D. Guilhermina 35, BARRA PIRAI, Rio de Janeiro, Brazilo, interŝanĝos brazilajn poŝtmarkojn, poŝtkartojn aŭ du paketcigaredojn por tri cigaroj de ĉiu ringstampo.

S-ro Herve Simoes, SANTANESIA, Rio de Janeiro, Brazilo, interŝanĝos propagandajn kraĵojn per brazilaj poŝtmarkoj.

PREMAJ ROMANETOJ

Verkitaj de konkursintoj
23 mallongaj noveletoj diverstemaj.
96 paĝoj, broŝ.

Prezo 1 ŝil., afranko 2p. aŭ 4 rpk.

Mendu ĉe U.E.A.
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

B O N V E N A D O N A C O

je Kristnasko

je datreveno

kiel dankesprimo

MORTO DE TRAJNO

de Freeman Wills Crofts

tradukita de Mason Stuttard

“Antaŭ ol mi komencis legi, mi timis, ke mi ne havos sufiĉe da persisto por tralegi libron, kiu neniom interesas min. La supozo montriĝis erara: Mi ne sentis emon formeti la libron, nur emis daŭrigi ĝis la fino, kaj mi nenion transsaltis . . . ”

Stellan Engholm en *Malgranda Revuo*.

Tole bindita, kun plurkolora polvŝirmilo—256 paĝoj 9 ŝil., afranko 6p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva perfekteco :

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., afranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., afranko 8p.

Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., afranko 6p.

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**